

Monato

AGAZINO SENDEPENDA

*Tria mondo
moviĝas . . .*

anoncetoj

Ĉu vi havas modemon? FEL serĉas kelkajn personojn, prefere en Belgio aŭ ĉirkaŭaĵo, kiuj posedas modemon (kaj komputilon!) kaj pretas fari kelkajn mallongajn testojn. Skribu al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

Filio de **Pola Esperanto-Asocio** en Olsztyn organizas en la tagoj 25-27an de junio 1993j. Esperantan semajnfino kadre de Jubileaj Tagoj de Olsztyn, titolitaj „Ni serĉas kontaktojn kun la unuiganta Eŭropo”. La programo konsistas el: vizitado de la urbo, interkona vespero, prelegoj kaj konkursoj. Loĝado ĉe esperantistoj aŭ en hoteloj (laŭ deziro kaj ebleco de la lokaj esperantistoj). Kore akceptataj estas esperantistoj povantaj prezenti interesan prelegon. Detalajn informojn donas kaj aliĝilojn akceptas (ĝis la 1-a de majo de 1993j.): Esperanto-Filio, pk.420, 10-900 Olsztyn 2, Pollando. Venu al Olsztyn, la ĉefurbo de regiono Varmio kaj Mazurio, konata pro la belaj lagoj kaj arbaroj.

Ni havas sepjaran filinon kaj kvinjaran filon kaj serĉas kontakton al samtipa familio (ne nepre tutesperantista) en suda Anglio. Bonvolu skribi al familio Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien.

ICEM-ESPERANTO (Kooperativa Instituto de la Moderna Lernejo Freinet-pedagogio) invitas vin partopreni en sia renkonto en Pardubice, Ĉeĥio, de la 14a ĝis la 23a de julio 1993. Petu pliajn informojn kaj aliĝilon: interesuloj de ekssocialistaj landoj al Jarmila Ryznarová, na okrouhliku 953/21, 53003 Pardubice, Ĉeĥio; aliaj landoj al Daniel David, 44, rue de Lens, F-59190 Hazebrouck, Francio.


Partoprenu Esperanto-Somerlernejon en Anglio inter la 7a kaj 13a de aŭgusto 1993! Detaloj haveblas de: The Warden, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Britio, ST12 9DG.

Internacia Asocio de Antropozofia Movado ekspektas kunlaborantojn el Esperantujo. Se vi ankaŭ sopiras kaj serĉas la komunan estadbazon por homo, socio, naturo kaj tekniko, tiam bonvolu ekamikigi kun ni, skribante al IA-AMo, Hasenbergweg 3, D-76275 Ettlingen, Germ.

La privata komerc-turisma firmao MARRAN (Moskvo, Ruslando) interesiĝas pri negoco de diversaj konsumvaroj el via lando. Oni pretas pagi per dolaroj aŭ aranĝi reciproke profitan barterkomercon, komunan produktadon. **Plej gravas kvalito, nivelo de prezoj kaj rapideco de liveraĵoj.** Oni havas eblecon loĝigi grupojn da turistoj en unuaklasaj aŭ en apudurbaj pli malmultekostaj hoteloj kaj garantias vizitojn al ĉiuj vidindaĵoj kun gvidistoj esperante kaj en iu nacia lingvo parolantaj; do temas ne nur pri esperantistoj. Demandoj kaj proponoj estas bonvenaj laŭ nia tel/fax (007) (095) 928-8049 Maran Stepanov (Esperante, angle, ruse).

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 40 belgaj frankoj* (BEF) por unu linio (minimуме 240 BEF*). Sama anonceto kvinfoje: triobla tarifo. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

*Por Eŭropa Komunumo + 19,5 % AVI.




Tiuj ĉi kaj multaj aliaj belaspektaj brakhorloĝoj estas haveblaj ĉe FEL aŭ rekte ĉe la importisto, Flory Witdoeck, Witte Nonnenstraat 9A, B-8400 Oostende. Prezo de la dekstra horloĝo 1700 BEF, de la maldekstra 1267 BEF (ambaŭ inkluzive imposton sed ekskluzive afrankon).

Ĉu vi volas...

- Liberecon kompletan?
- Solvon por la nutraĵoproblemo?
- Solvon por kreskanta senlaboreco?
- Fari finon al ĉiaj militoj?
- Solvon por la mediomalpurigo?

Ĉu vi estas preta vin dediĉi aktive por ĉi tio? Bonvolu pagi 300 BEF je la konto 733-1671345-65 de la fondaĵo „Malriĉuloj de spirito”, kun mencio de via nomo kaj adreso. Vi ricevos plian informon.

LA GAZETO



mondkultura
sendependa
esperantisma

PETU PROVNUMERON ĈE:
LA GAZETO
55210 CREUE, FRANCIO

ESPERANTO-KONFERENCO EN HUNGARIO KONDOROS

17-24 julio 1993



TEMO
Kial paroli Esperanton?

PROGRAMO

prelegoj, debatoj, kursoj,
Osiek-premio, simpozioj,
teatraĵoj, distroj, libroservo

24-27 julio 1993
tri tagoj en Budapeŝto

Informoj, aliĝoj:
Eric Laubacher
1, rue des Vosges
F-78180
Montigny-le-Bretonneux
Francio
tel.: (1) 30 96 67 91

Monato

internacia magazino sendependa
por politiko, ekonomio kaj kulturo

monata revuo en la internacia lingvo Esperanto □ legantoj en 75 landoj □ fondinto: Stefan Maul □ 14a jarkolekto □ aperas principe la 1an de ĉiu monato □ abontarifo varias laŭlande; petu ĝin de la eldonejo ■ **eldonejo:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33; poŝtĉekkonto Bruselo n-ro 000-0265338-43 nome de Vlaamse Esperantobond, Antwerpen □ valida anoncarifto: n-ro 6 □ kompostita kaj presita en la eldonejo □ por adresŝanĝoj nepre menciu la kodon kiu troviĝas dekstre sur la adreŝlipoj ■ **redaktoroj:** William Auld, Gerrit Berveling, Tim Carr, Mark Fettes, Marco Gazzetta, Evgeni Georgiev, Paul Gubbins, Andy E. Künzli, Girvan MacKay, Stefan Maul, Sean Osborne, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, Krys Ungar, Guido van Damme, Jean-Pierre VandenDaele □ 150 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj ■ aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj) □ represo kaj traduko el MONATO nur kun indiko de la fonto □ kopi-raĵo ĉe la eldonejo □ ne sendu registritajn leterojn □ ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj; mendu ĝin pagante 20 NLG al UEA, konto NO-RA-F □ *verantw. uitgever:* Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen □ la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.



Enhavo


Noticoj	4
El mia vidpunkto	5
Leteroj	6
Politiko	8
Moderna vivo	11
Medio	13
Scienco	14
Ekonomio	16
Turismo	18
Lingvo	19
Libroj	21
Novelo	22
Eseo	24
Arto	26
Spirita vivo	27
Hobio	28
Enigmoj	29
Humuro	30

«De kelkaj jaroj en multaj afrikaj landoj ekzistas libero de la gazetaro. Abundas periodaĵoj de ĉiuj tendencoj: intelektaj, stultaj, insultaj, kontraŭĉio-aj, ktp. Ĝenerale nur mankas la legantaro. La ĵurnaloj kelkfoje vere aperigas interesajn tekstojn kun opinioj de popolanoj. Tiel, ekzemple la plej grava ĵurnalo de Gabono, *L'Union* (La unuiĝo), havas ĉiutage sur sia frontpaĝo rubrikon verkitan de iu Makaya, kiu esprimas la opiniojn de la meza civitano pri politiko, la vivkondiĉoj, la internacia vivo, ktp. Kvankam en tiu rubriko jam ofte aperis ŝokaj tekstoj, kiuj elvokis akrajn reagojn de politikistoj aŭ de aliaj, eble neniu teksto ĝis nun estis tiom surpriza kiel tiu en la eldono de la 9a de decembro 1992. Makaya jen tutsimple diras kion multaj pensas, sed ne aŭdacas esprimi: nome ke en la kolonia tempo oni fartis pli bone ol nun. Jen tradukoj (el la franca lingvo) de kelkaj el liaj frazoj: „Nun la kontinento estas pli regresinta ol dum la (koloniaj; red.) tempoj”, „Nuntempe tiuj, kiujn ni forpelis, revenas por savi niajn popolojn de malsato kaj masakroj”; „Mia patroavo ne hezitus voĉdoni jese por Francio aŭ por la brita aŭ hispana krono”; „Al kio servis la sendependeco? Al la detruado de Afriko!”; „Kaj se de Brazza revenus? Ĉiuokaze la afrikanoj ne bedaŭrus tion.”

La fakto, ke tiu teksto aperis en la plej neŭtrala gazeto de unu el la plej prosperaj landoj de Afriko, kaj ke en la postaj tagoj ne venis reagoj por dementi ĝian enhavon, indikas, ke en Afriko ŝanĝiĝas la opinioj pri la gloroj de la akiritaj sendependecoj. Tiaj opinioj jam aperis en kelkaj libroj kaj en studoj, eĉ verkitaj de afrikanoj mem, kaj ili estis kelkfoje buŝe konfiditaj al fidindaj amikoj. Nun ili jam aperas publike sur la frontpaĝo de la gazeto. Pesimisma konstato en kontinento, kiu ekkonscias seniluziĝe pri la mizero ĉiuflanke kreskanta.»...

Tiel skribas al ni Wim de Smet, plurjara kunlaboranto de MONATO, kiu profesie laboris en pluraj evolulandoj, nuntempe en Gabono.

Ĝuste pri tiu vastega problemaro temas la eseo (p. 24) en la nuna numero. Ĝi estis verkita de alia flandro (hazarde eĉ samvilaĝano de De Smet) Edward Symoens [Simuns]. Ankaŭ li dediĉis la plej grandan parton de sia vivo al evoluhelpo kaj loĝis dum jardekoj en centra Afriko. Symoens verkis, speciale por MONATO, artikolserion pri liaj travivaĵoj en Zairio antaŭ trideko da jaroj. Tiu artikolserio komenciĝos en la venonta,



aprila numero sed lia nuna eseo estas kvazaŭ enkonduko al ĝi. La serio ilustras, nun vidite de iom fore en la tempo, ĝuste tiun periodon pri kiu skribis Makaya en L'Union, la periodon en kiu iom post iom ĉiuj afrikaj ŝtatoj postulis sian sendependecon. Ĉu vere tiu sendependeco estis la unua ŝtupo al la detruado de Afriko? Aŭ ĉu Makaya troigas? Ne maltrafu la temon en la nuna kaj en la postaj numeroj de MONATO!

La angla – subtitolita en Anglio

Necesis dum brita televida intervjuo kun sepjarulo el Tyneside [Tajnsajd], en nord-orienta Anglio, anglalingvaj subtitoloj cele al klara kompreno, miris brita ĵurnalo *The Guardian*.

Temis ne sole pri sepjarula ĵargono, sed pri regiona prononcmansiero fremda al milionoj da angloj, ĉefe en Sud-Anglio.

Kaj ankoraŭ restas tiuj, kiuj kredas, ke la angla estas ĉie komprenata lingvo... PG

Gapantoj mallaboremaj

Britoj malpli laboras kaj pli telespektas ol ĉiuj aliaj eŭropanoj, laŭ statistikoj lastatempe publikigitaj.

Meza brita labortago sumas nur 6 horojn kaj 25 minutojn, kompare kun eŭropa mezumo de 7 horoj kaj 20 minutoj. Plej laboremaj estas portugaloj kaj hungaroj.

Preskaŭ 90 % de britoj telespektas dum pli ol kvar horoj tage, kompare kun nur 78 % de svisoj, kiuj algluiĝas al la ekrano dum nur 2 horoj kaj duono.

Plej dormema popolo en Eŭropo: belgoj, kiuj sin retiras litten dum 8 horoj kaj duono, pli ol duonhoron pli ol la eŭropa mezumo, kaj dum unu horo pli ol grekoj. La plej feliĉaj homoj estas danoj kaj nederlandanoj; la plej mizeraj, hungaroj – eble pro tio, ke ili tiom laboras.

Paŭlo GUBBINS

Esperanto per satelito

Dum festotagoj kaj dimanĉoj la esperantlingvaj elsendoj de Radio Vatikana estas nun kapteblaj per la satelito Eutelsat II F 1, 13° oriente, kiel subportanto de la arablingva stacio MBC laŭ frekvenco 11 554 GHz, subportanta aŭdfrekvenco 7,774 MHz. Per tiu nova tekniko la interesaj programoj de Radio Vatikana estos aŭskulteblaj sub perfektaj kondiĉoj. Por pli da informoj: Radio Vatikano, Esperanto-elsendoj, Vatikano.

Günther BECKER

Aŭstroj malŝatas lingvojn

La aŭstroj ne tro interesiĝas pri fremdaj lingvoj. Dum la lastaj kvar jaroj okazis trifoje la lingva foiro *Expolingua*, kiun vizitis nur malpli ol po 10 000 vizitantoj. Tio kaŭzis deficion grandegan kaj oni ne plu okazigos la lingvan borson en Aŭstrio.

Komence de 1992 oni multe propagandis *Blue Danube Radio* (BDR;

Radion Blua Danubo), kies lingvo ĉefe estas la angla. La multekosta varbado kaj tuttaga dissendado ne multe efikis: nur 1,9 elcentoj de la aŭstroj regule aŭdas BDR.

Sendepende de tio oni povas jam nun prognozi, ke la sekva generacio en Aŭstrio ne perfekte regos iun fremdan lingvon, se oni legas la novan regularon por la abiturienta ekzameno. Ekde 1993 la gimnaziaj gelnantoj – laŭ la nuna planado – ne plu devos trapasi parolan ekzamenon en iu tiel nomita 'vivanta' fremda lingvo, se ili trapasos tiun ekzamenon en skriba formo.

Walter KLAG

Krimea kontraŭ ukraina

En multaj urboj de Krimeo (Ukrainio) la lokaj urbestroj decidis forpreni de la urbodomoj la ukrainan ŝtatan flagon, kaj anstataŭigi ĝin per krimea, kiu fakte laŭkoloro ripetas la rusan standardon de la imperia tempo. Dume la ukraina simbolo restis kaj flirtas en tri grandaj urboj de la duoninsulo: Sebastopolo, Feodosio kaj Krasnoperekopsk. La prokuroro de la krimea aŭtonomio modeste silentas.

Viktor PAJUK

Malbona estonteco por aŭtoj


Ekde la unua de januaro oni rajtas parki sian aŭton en la stratoj de la viena urbocentro maksimume 90 minutojn – tiel decidis la viena registaro. Eĉ vienanoj, kiuj loĝas en tiu kerna regiono, devos pagi por la parkado. Per tiu decido oni volas malpliigi la aŭtotrafikon, senaŭtigi kelkajn historiajn placojn kaj plifortigi la publikajn trafikilojn.

Walter KLAG

Traduk-telefono

Jam komence de 1993 germana elektronika kompanio *Siemens* [Siemens] prezentos prototipon de traduk-telefono, kiun ĝi evoluigis komune kun universitato en Karlsruhe (Germanio), universitato Carnegie Mellon en Pitsburgo (Usono) kaj internacia esplorinstituto ATR en Kioto (Japanio). Sekve homoj, sen iu ajn scio de alia lingvo, povos telefoni en usona, japana kaj germana lingvo, se la gepatra lingvo estas unu el tiuj ĉi tri lingvoj. Tamen, Siemens konfesas, ke daŭros ankoraŭ multajn jarojn, ĝis oni povos serie produkti la tradukantan telefonon.

Stefan MAUL



Kiu ne posedas aŭtomobilon uzu la fervojon. Pro tio en la orient-eŭropaj landoj, kun malmulte da aŭtomobiloj, la trajno estas uzata pli ol aliloke. Tamen ekzistas esceptoj je ĉiu regulo. Ĉekape troviĝas la svisoj kiuj mezume veturas 1637 km jare per la vagonaro. Ankaŭ francoj, aŭstroj kaj germanoj estas tre trajnemaj, kvankam inter tiuj lastaj ĉefe elstaras la loĝantoj de la orienta parto, kiuj ja ankaŭ antaŭ nelonge sentis mankon de aŭtomobiloj.

Giganta tasko post gigantaj katastrofoj

Jam antaŭ la revoluciaj ŝanĝoj en orienta Eŭropo oni sciis en cetera mondo, ke tie medi-damaĝoj estas grandaj, ke en ŝtatkapitalisma kaj totalisma sistemo oni ne multe zorgas pri protektado de naturo kaj vivmedio. Supozoj kaj konjektoj trovis konsternan konfirmon en la kulmina katastrofo en Ĉernobilo, kiu poluis ne nur vastajn partojn de Ukrainio kaj tiama Sovetio, sed la tutan eŭropan kontinenton, kaj eĉ pli...

Sed nun iom post iom malkovriĝas la kompleta vero, konatiĝas la totala dimensio de la ekologiaj pekegoj en tiu mondosfero. Unuajn terurigojn spertis germanoj, kiam post unuiĝo de la dividita lando tre rapide oni konfrontiĝis kun neimageblaj - ĝis tiam - damaĝoj kaŭzitaj kaj de socialisma orienta Germanio kaj, eĉ pli draste, fare de la okupacia ruĝa armeo, kies lastaj soldatoj fus, kiam mi tajpas ĉi tiujn liniojn, eliras Germanion. En ĉiu loko forlasita de la ruĝa armeo oni trovis terurajn rubaĝojn, kies efektivan medidetruan efikon ofte oni eĉ ne povis tuj ekkoni kaj prijuĝi. La ruĝa armeo nelaste pro tio ne sukcesis vendi siajn objektojn en Germanio, ĉar interesigantaj aĉetemoj devis timi pri perdo de grandaj monsumoj, kiujn ili devus investi por forigi medidamaĝojn.

Terurigaj konfirmoj

Intertempe oni ricevis pli kaj pli multajn konfirmojn pri damaĝoj, kies eventualan ekziston antaŭe priskribis nur raportoj de sekretaj servoj pri Sovetio kaj aliaj komunismaj landoj. Iom post iom aŭtoritatuloj kaj koncernaj instancoj en postkomunista Ruslando mem informis pri ili. Do ni nun scias pri gravaj ŝanĝoj faritaj pri riveroj kaj lagoj, kiuj kaŭzis perdon de ekologia ekvilibro en vastegaj regionoj. Ni scias pri nuklea rubaĝo en siberia maro, kiu radioaktivigas - pri la sekvoj oni povas nek supozi nek prognozi, nur timi ĝis nun. Inter tiu rubaĝo estas minimume kvin atomreaktoroj, kiujn oni dronigis en maro. Ni havas konfirmon pri giganta katastrofo, kiu trafis en la 50aj jaroj la plutonian fabrikan en Majako (Uralo); pluraj akcidentegoj ĉe produktado de atombataliloj poluis grandegan areon. Milojn da loĝantoj oni devis evakui, 450000 homoj suferis kontaĝojn, minimume 1000 homoj mortis pro malsaniĝoj kaŭze de radioaktiveco. Germana ministro diris: „La me-

didamaĝoj estas tiom gigantaj, ke ni eĉ ne havas imagon pri la veraj dimensioj.” (Germanio helpas al Ruslando en esplorado de la ekologiaj damaĝoj, por ke tiel oni povu trovi taŭgajn solvojn de la problemoj.)

Prezo de malvarma milito

Jevgeni Primakov, estro de rusa eksterlanda informado, diris antaŭ nelonge, ke ĉ. 18 elcentoj de la teritorio de eksa Sovetio poluiĝis per produktado de atomarmiloj. Rusa mediministro Viktor Danilov-Daniljan diris samtage, ke ĉirkaŭ 100000 rusoj vivadas en forte radioaktive poluitaj regionoj.


Ni scias ankaŭ, ke inter 1955 kaj 1963 sur insuloj en nordpolusa maro Sovetio eksplodigis ne malpli ol 90 atombombojn surface; laŭ informoj de mediprotekta organizaĵo Greenpeace (Verda Paco) tie oni enmarigis 15 reaktorojn de nukleaj submaraj ŝipoj kaj 17000 barelojn kun nuklea rubaĝo. Kaj ni ne forgesu, ke ankoraŭ aktivis multaj atomreaktoroj de sama speco kiel tiu de Ĉernobilo en orienta Eŭropo.

Solvoj ŝajnas neeblaj

Tiun ĉi hororan bildon de ekologia ĥimero ni dankas al la malvarma milito. Ni ĉiuj, la tuta mondo, nun pagas multe pli altan prezon pro tiama konkurenca armado de Sovetio kaj Usono ol iam ajn ni povis imagi kaj timi. Ŝtatkapitalisma Sovetio ne kapablis elteni tiun konkurencon sen neglektado de ĉiaj mediprotektaj rimedoj. Ĝi fariĝis mem le unua kaj plej grave trafita viktimo de tiu detruiga armado, ĉar ĝia ekonomio ne povis konkurenci al tiu de okcidento. Por ne jam pli frue bankrotiĝi, komunismo do preferis mortigi siajn proprajn civitanojn anstataŭ konfesi, ke ĝi ne kapablas vere konkurenci. Sekve la ruĝa diktaturo ŝtelis ankaŭ al postvivantoj ties estontecon. Kaj la ekonomia bankroto kaj la gigantaj medidamaĝoj estigis problemojn al la novaj ŝtatoj sur teritorio de eksa Sovetio, tiel ke dum multaj, multaj jaroj solvoj ŝajnas neeblaj. Tiom da helpo, kiom vere necesus, ankaŭ riĉaj okcidentaj landoj ne povas disponigi.

Ĉu okcidento pli nobla?

Sendube, nur kun abomeno oni povas rezoni pri tia malhumana ideologio, kiu poluis ne nur la cerbojn de la homoj sed ankaŭ ties korpojn kaj vivmedion. Sed, momenton! Kiun rolon ludis



la okcidenta kapitalisma mondo, ĉu pli noblan, pli moralan ol la ŝtatkapitalisma? Kial okcidentaj registaroj tiom longe silentis, kvankam ili ja havis raportojn de siaj sekretaj servoj pri damaĝoj pro atomarmado en Sovetio? Ĉu eble ili silentis pro tio, ke ankaŭ en okcidento okazis gravegaj akcidentoj ĉe produktado kaj testado de atombataliloj? Pri iuj oni ja scias, sed ĉu ni scias pri ĉiuj? Ĉu la konkurenca armado dum la periodo de la malvarma milito e estigis homviktimojn ankaŭ en okcidento? Kaj ĉu ne la naturo, en ĉiuj okazoj, ĉiam fariĝis viktimo de tiu armado?

Certe, la okcidenta ekonomio ne nur eltenis la armadan konkurencon, sed ĝi eĉ prosperis konsiderinde. Sed, denove momenton! Je kies kosto? Ĉu ne konsumkapitalismo same, se ne pli draste ol ŝtatkapitalismo, damaĝas naturon kaj vivmedion? Kio, se ne okcidenta industriproduktado kaj milionojn da okcidentaj aŭtomobiloj detruas la ozontavolon en la atmosfero, kulpas pri ekstermado de tropikaj arbaroj, la pulmo de la terglobo? Kie estas pli alta montaro da kemiaj kaj aliaj venaj rubaĝoj ol en okcidenta konsumekonomio? Kiu importis ekologiajn problemojn en iamaj kolonioj de Afriko kaj Latina Ameriko se ne la ekspluatema okcidento?

Neniu morala supereco

Kiel ajn, neniu, nek postkomunistoj nek okcidentanoj rajtas starigi sin sur moralan piedestalon, kiam temas pri medidetrado aŭ mediprotektado. Kio urĝe necesas, ne estas moralaj kondamnoj, sed realisma strategio por savi terglobon kaj homaron de detruigo kaj ekstermado. Tiu ĉi strategio povas esti nur energia reciproka helpado. La ideologioj, ambaŭsfere, perdis siajn nimbojn; sed ne utilas nun eltrovi, kiu ideologio pekis pli multe. Ni devas eviti estontajn pekojn. Jen la giganta tasko post gigantaj katastrofoj.

Stefan MAUL

Ruzaj rusaj informoj

Reage al la artikolo de BN (MONATO, 1992/12, p. 8) kaj la intervjuo kun Sergej Kurnecov (MONATO, 1993/1, p. x), mi decidis skribi al vi, ĉar la 4 jaroj kiujn mi pasigis en Estonio kaj la abundo da informoj pri eks-Sovetio kiu atingis min en Israelo, rajtigas min fari tion. La ruslingva loĝantaro en la ĉebaltaj landoj entute ne sentas sin kiel nacian malplimulton. Oni ĉiam memoras pri la granda patrujo „Rusio” malantaŭ la dorso kaj ĝuste tial facile parolas pri la perforta varianto de la konfliktsolvo. Ĉu ne estas hontinde ke tiom grandaj kvantoj da rusoj en la baltiaj landoj pretas militi helpe de la rusa armeo je la rajto ricevi litovan, latvan aŭ estonan civitanecon anstataŭ la rusa? Kaj kiel tiuj homoj, provokinte intervenon de eksterlanda militistaro por la rajto „ne lerni la lokan lingvon”, esperas poste „pace” kunvivi kun la loka popolo? Tutcerte, la rusparolantoj ekster Rusio suferis severan psikologian ŝokon: subite ili malkovris ke ili loĝas en fremda lando. Tamen iliaj deziroj krei por si „malgrandan Rusion” ene de la baltaj landoj estas provoko. Bonege priskribis tion Stefan Maul en sia artikolo „Fremduloj en nia domo”. Estas nur du elirvojoj: akcepti la novan realecon kaj fari ĉion eblan por adaptiĝi; aŭ reiri al la devenlando, helpe de ambaŭ registaroj. La tria vojo: milito helpe de Rusio estus katastrofo por ĉiuj. La kreskanta naciismo en Rusio kaj la plifortiĝo de konservativaj tendencoj en la nuna rusa politiko estas faktoj, kiujn oni ne rajtas ignori se oni parolas pri la minacoj de la nuna situacio en la baltaj landoj. Nur la saĝeco de la rusparolantaj loĝantoj kaj la stabiligo de la ekonomia kaj politika situacio en Rusio mem, povas preventi tiun katastrofon.

Eugenia Rubinov-Fajgenboj, Israelo
iama studentino pri rusa literaturo
en la universitato de Tartu, Estonio

Mensogoj pri Latvio

lu B.N. (MONATO, 1992/12, p. 8) en „Neanoncita Milito” perfortas la veron. Dum la lasta jaro daŭre aperas en amaskomunikiloj informoj pri rompo de la homoj rajtoj de ne-latvoj. La kialojn de tiuj mensogoj ni komprenas: la malnovaj regantoj multon perdis pro la disfalo de Sovetio kaj volas regajni siajn privilegiojn. Ili dum multaj jaroj ne vane organizis sian strukturon simile al malfacile vundebla mafio. Kvankam ili ne plu havas oficialan potencon, ilia mono kaj komunika sistemo ebligas al ili mondscale organizi

misinformadon. Ne nur la rusa ministro pri eksteraj aferoj „ploras” pri la rompo de la homaj rajtoj en Baltio. Similaj artikoloj aperadas ankaŭ en usona *Life* kaj en esperanta *Monato*. Legantoj komprenos la kialojn de la atakoj ĉefe kontraŭ Latvio – Litovio kaj Estonio estas atakataj malpli ofte – ĉar ĝi estas la plej malforta el la triopo, kaj ĝi situas en la mezo. Duono de ĝia loĝantaro estas ne-latvoj (multaj el ili eks-armeanoj). Kiaj estas la ĉefaj „perfortoj de homaj rajtoj”? Nu, oficialigo de la latva lingvo, tiel ke alilingvanoj nepre devas ĝin lerni kaj ekzameniĝi por ricevi postenojn: ju pli bona la lingvokono des pli alta povas esti la posteno. Due, antisemitismo: tamen latvoj kaj hebrea amike loĝas en Latvio dum jarcentoj. La unua refoondiĝinta socio estis Societo de hebrea. Mi tamen devas konfesi ke en malaltaj tavoloj de la loĝantaro oni trovas – kie ne? – antisemitismojn kaj rasismojn. Trie: persekutoj de tiuj, kiuj ne samopinias kun la reganta naciisma ideologio. Ekzemplaj viktimoj estas S. Parvenos, sadisto-amatoro, vicestro de „Nigraj Biretoj”, kiu estas punita je du (!) jaroj pro torturado de arestitoj, kaj A. Rubiks, unua sekretario de la iama komunista partio kaj unu el la ĉefaj subtenantoj de la aŭgusta puĉo. Finfine estas la problemo de la civitaneco. Ni renovigis la Latvan Respublikon de la jaro 1918 kiu havis leĝon pri civitaneco. La nuna parlamento elektita sub okupacio ne rajtas ŝanĝi tiun leĝon. Tial en estontaj elektoj de nova parlamento rajtos nur partopreni latvoj, t.e. tiuj, kiuj havas sian civitanecon de antaŭ la soveta okupacio. Dum tiu okupacio Latvio perdis trionon de sia loĝantaro, kiu elmigris dum granda homamaso enmigris. La unua grupo rajtas voĉdoni, la dua ne. La nove elektota parlamento povos ŝanĝi la leĝon pri civitaneco. En tia proceduro mi, same kiel multaj komisionoj de diversaj internaciaj organizaĵoj, ne vidas rompon de homaj rajtoj. Mi esperos ke tiu ĉi letero iomete klarigas la nunan situacion en Latvio kaj forigos la mensogojn. Maris Jakobsons, Latvio

Prezidanto de Latvia Esperanto-Asocio

Miriga redaktado

La redaktoprincipoj de MONATO daŭre mirigas. B.N. (MONATO, 1992/12, p. 8) pretendas kritiki latvan naciismojn, sed mem – ĉu nekonscie? – esprimas krudan ŝovinismojn. Tio estas lia/ŝia rajto, sed plurmaniere la prezento de tiu polemikaĵo incitas la

leganton. Ege misgvida rubriko (Politiko: BALTA MARO, Neanoncita Milito), miskomprenitaj aŭ falsigitaj faktoj, tre tendenca refero de historiaj eventoj, anonimeco de la aŭtoro, eĉ manko de indiko pri nacieco kaj loĝlando. Ŝajnas ke B.N kaj MONATO volas ĵeti oleon sur la fajron de latva naciismo. Se la revuo trovas la temon grava (kaj mi konsentas), ĝi tamen traktu ĝin pli singarde kaj serioze! Ĝi povus komisi al iu senpasiulo ne implikita intervui rusajn, latvajjn, estonajn esperantistojn kaj prezenti artikolon redaktitan kun respekto kaj sen troa tendenco. Ne misloku polemikaĵon aŭ „leteron de leganto” (tro longan) kiel novaĵartikolon. Fine, se BN povas loki la eksan Sovetion ĉirkaŭ la Balta Maro, eble ankaŭ mi subskribu per

Sten Johansson
svedo loĝanta ĉirkaŭ la Balta Maro
(en Svedio)

Ankaŭ en leteroj

Mi de tempo al tempo ricevas leteron de legantoj de MONATO adresita al „sinjoro Seikō”. Tio estas natura kaj pri kio mi ne plendas? Sed nun ke la aliaj rubrikoj de MONATO (krom LETEROJ) observas la laŭdindan praktikon skribi familiajn nomojn en versaloj, mi pensas ke tia eraro estos facile evitata. Nur ankaŭ la rubriko LETEROJ presu familiajn nomojn en versaloj aŭ majuskloj kiel mia originalo. Forgesu pri originalo de aliaj en ĉiel penseblaj pseŭdonomoj, kiujn vi kutimas fidele reprodukti.

YAMASAKI Seikō, Japanio

Unuiĝinta Naciaro

Mi notis ke kelkaj kontribuantoj al MONATO emas uzi la esprimon „Unuiĝinta Naciaro” kvankam la ĝusta traduko de la nomo de la mondorganizaĵo estas „Unuiĝintaj Nacioj”. Ĉiuj kvin egale aŭtentikaj tekstoj de la Ĉarto de UN, la angla, la ĉina, la franca, la hispana kaj la rusa, parolas pri „Unuiĝintaj Nacioj” kaj tial ankaŭ la Esperanto-traduko de la Ĉarto, aprobita de UEA, uzas tiun terminon. La esperantan tradukon eldonis en Nov-Jorko Unuiĝintaj Nacioj mem kiel dokumenton DPI/511-40712 (en 20 000 ekzempleroj).

Eskil Svane, Francio
Em. UN-funkciulo

R.d.l.r.: Kion pensas niaj legantoj? Ĉu „Unuiĝinta Naciaro” ne estas pli pura Esperanto ol la senpripensa rekta traduko el la grandaj „oficialaj” lingvoj?

Mankas gvidantoj

Stefan Maul nomas la novan usonan prezidanton, Bill Clinton, „politika klaŭno” (MONATO, 1993/1, p. 5). Leginte tion, mi sincere ĝojis pri la nesignifo de Esperanta magazino. Bone ke estas malmultaj legantoj kaj ke mankas la disvastiĝinteco en la ekstera publiko. Mi ne trovas Clinton ekstrapagante komika. Ja la partikonferencoj en Usono, kiel mi vidis ilin en televido (ankaŭ de CNN), estas alispecaj ol en Germanio, sed nur aroganta vidpunkto en la malnova kontinento ebligas levi sin morale super la kutimoj de la nova kontinento. Kiam Stefan Maul jam survojas ofendi meritojn, li deklaras prezidanton Walesa „taktikulo” potencsavanta. Sed mi volas danki al li pro liaj klarvidaj klopodoj en la sindikato Solidareco komencantaj la vojon al demokratio en la oriento. Kanceliero Kohl ĝis nun havis nur du jarojn por reordigi la dekadencan de 40 jaroj de „socialismo”, do ne estas prave riproĉi al li, ke post la unuiĝo li „fiaskis en la tasko majstri la sekvajn problemojn” – eventuale tio validas por sinjoro Maul kaj la problemoj de MONATO. Lia instruo: politikistoj de 1945 ĝis 1965 estis eminentaj, tiuj poste nuloj. Mi opinias, ke sinjoron Maul simple misgvidas la aŭreolo de la pasinteco, dum la nuntempo aperas kiel malfacila. Tio estas konata psikologia fenomeno. Kiel pesimisto li eĉ subtaksas verajn sukcesojn de 1992: Unuiĝinta Naciaro komencis agi aktive kiel ordiganto en la mondo eĉ kun trupoj, kaj la plua paŝo al Eŭropa Unio estas epokfara ekzemplo por forigo de landlimoj (Maastricht); koncerne tion mi listigas inter la negativajoj de 1992 la ankoraŭan ekziston de prefersento por naciaĵoj kiel bedaŭrinde videblas en Danlando.

Werner Bormann, Germanio

Nomoj, nomoj, nomoj...

Samideanoj Cnudde kaj Harlow skribis (MONATO, 1993/1, p.6) pri la problemo ĝuste kiel kaj kie aperi nomojn. La sinjoroj estas relative bonŝancaj. Mia flankokupo estas genealogio, kaj de tempo al tempo mi troviĝas en la arkivejoj de Irlando (kie mi naskiĝis) por naĝi inter paĝegoj da nomoj. Post la angla konkero de Irlando en la mezepoko, oni trudis la anglan lingvon al la insulo, kaj tio kaŭzis ĥaoson ĉe familiaj nomoj. Ofte oni rekte tradukis la nomojn, ekzemple Mac an Bhreitheamhnaigh (filo de la juĝisto) al Judge, aŭ Mac an Ghabhann (filo de la forĝisto) al Smith. Sed oni provis jen kaj jen reprodukti la

sonon de gaela vorto, do el Mac Ambróis (filo de Ambrozio) kaj Mac Asmuint (filo de Asmunt) aperis Cambridge kaj Casement. Sed la plej ĝena kapdoloro en mia esploro devenas de unu praulo, Patrick M'Geraghty (1798-1864). Kiam mi serĉas lin en registro, mi ĉiam devas memori kion la angla lingvo faris al lia bela gaela nomo: Mag Oireachtaigh (filo de la asembleano): ĝi ricevis 128 „tradukojn”: de Garrity, trans Jerety kaj M'Garety al MacGarraghty kaj Magaretty ĝis McGarty, Megaratty por finiĝi ĉe Megerty. (Mi mencias nur kelkajn ŝtupojn!)

Seán Osborne, Nederlando

Clinton

En sia ĵusa vidpunkto (MONATO, 1993/1, p. 5) Stefan Maul karakterizas la novan usonan prezidanton, Bill Clinton, kiel politikan klaŭnon. Kial tiu fia insulto precipe sendigna fare de profesia kaj supozeble serioza ĵurnalisto? Ĉu eble tial ĉar Clinton ŝatas kaj publike ludas ĵazmuzikon? Sciu ke Clinton ne nur estas lerta saksofonisto, sed ankaŭ kapabla politikisto. Li estis juna universitata profesoro pri juro kiam li, nur 32jara, estis elektita guberniestro, t.e. prezidanto de la federacia ŝtato Arkansas en 1978. Li perdis la postan elekton, sed la sekvanta elekto kondukis lin denove al la guberniestra oficejo en la ŝtata ĉefurbo, Little Rock. Dum deko da jaroj kiel ŝtatestro de Arkansas li energie kaj sukcese laboris por modernigi kaj diversigi la ekonomian strukturon de sia ŝtato, plibonigi ĝian edukan sistemon kaj antaŭ ĉio harmoniigi la interrasajn rilatojn. Laŭ mia opinio tia agado ne estas plotike klaŭneska.

Eskil Svane, Francio

Hajkoj

Eble legantoj volas verki hajkojn leginte „Internaciaj hajkoj”-n (MONATO, 1992/4, p. 29). Nun mi klarigas du regulojn de hajkoj: 1. Hajko devas konsisti el tri partoj. Oni devas uzi kvin, sep kaj kvin literojn laŭvice. En la japana unu litero montras unu silabon. Ekzemple mia nomo uzas sep literojn en la japana. Do en Esperanto uzu kvin, sep kaj kvin silabojn. 2. Hajko necesas inkluzivi vorton, kiu montras sezonon. Ekzemple neĝo, ĉerizfloraĵo kaj aliaj. Mi prezentas hajkon de Baŝo, la plej fama hajkisto: *Malnova lageto / Rano plonĝas / Sono de akvo.* En ĉi tiu hajko rano signifas printempon.

Uĉida Masatomo, Japanio

Inda je helpo

Ĉi-okaze, kiam mi ricevis la lastan ekzempleron, mi dankas MONATOn kun kontento, mi adiaŭas kaj deziras por la estonteco multan sukceson. Por 1992 mi pagis 600 HUF (proksimume 4% de monata pensio). Tio estis ankoraŭ ebla. Por 1993 la peranto petas 1700 HUF (aŭ plialtigo je 183 %). Bedaŭrinde tial mi devas rezigni pri abono kaj legado de MONATO. Dum jaroj mi legis la revuon kaj trovis la enhavon interesa. Nun mi bedaŭras, ke mi ne proponis pli frue skribi artikolon pri fumado kaj sano. Tial mi uzas tiun ĉi lastan eblecon:

Staru antaŭ ni

la kontraŭfumada afero!

Supozeble multaj legantoj trovas aktuale, aperi en revuo MONATO kontraŭfumadan artikolon. Mi emeritiĝis, kiel kondukto de Hungara Ŝtatfervo. En ĉiutaga deĵoro mi spertis kontraŭecon inter fumantoj kaj nefumantoj. La fumantoj ofte ne estis obeemaj al la reguloj. Ekzemple kontraŭ tiu regulo, ke sur la trajnoj „kiuj vojaĝas malpli ol 100 kilometrojn, fumado estas malpermesita”. Aliflanke, kiam la fumanto atentis la regolon, tamen faris malagrablaĵon por nefumantoj. En kupeoj por fumantoj ĉiam restas pli da liberaj lokoj. Tamen li/ŝi preferas okupi ankaŭ la lastan liberan sidlokon inter nefumantoj. Estas fumantoj, kies vestoj malbone odoras de la fumo. Ofte okazis: la sentema nefumanto prefere ekstaris kaj okupis starlokon sur la koridoro, forlasinte la forte fumantan najbaron. Do, multaj fumantoj ne scias, ke ili povas fari malagrablaĵon por nefumantoj. De tempo al tempo mi aŭdas en la radio, ke en Francio tiurilate estas bona situacio. Estus interese informiĝi, kiel ŝanĝiĝis tiu situacio en aliaj partoj de la mondo.

Johano Karolyi, Hungario

N.d.l.r.: Eble monhava bonvolemlulo povas helpi tiun ĉi fidela abonanto kiu „devige” malabonis.

Pri la enhavo de leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redakcio havas la rajton mallongigi leterojn. Reagoj al artikoloj ricevas prioritaton. Skribu al:

**FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MONATO (Leteroj)
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Belgio**

Ĉu kvotlando?

Multaj civitanoj en Italio sin demandas, ĉu eble valoras la penon ree bapti sian landon. Nova nomo havas nun neatenditan, kaj depriman, sorton: „Kvotlando”, tio estas lando kie oni faras negocojn per kvotoj da milionoj aŭ miliardoj da liroj.

La unua ekblovo, anonco de la uragano kiu skuos la mondon politikan kaj administran, okazis en februaro 1992. Tiam estis arestita Mario Chiesa [Marjo Kieza], administranto de maljunulejo, kiu estis surprizita dum li ricevis kvoton da kelkaj milionoj.

Verdire, iuj simptomoj, ke ne ĉio laŭleĝe funkciadis, vidiĝis jam antaŭe. Ekplodis fakte kelkaj skandaloj pro mono donita al politikistoj – eĉ al ministroj – por akiri koncesiojn je publikaj laboroj. Iuj kulpuloj estis arestitaj, sed la enketoj plejparte blokiĝis. Kaj tiuj malmultaj politikistoj, kiuj kuraĝis publike paroli pri tio aŭ peti pli grandan klarecon, estis akuzitaj siavice pri mensogo kaj obskuraj intrigoj, kaj finfine estis silentigitaj, en iuj okazoj eĉ helpe de siaj partioj.

La enketo „Puraj Manoj”

Kiel ajn, la aresto de Mario Chiesa estis tio, kio ekfendis kaj sekve disfalis la digon, malantaŭ kiu sin kaŝis la fumanta maro de l' koruptado. Tiu arestita administranto, fakte, esperante je punredukto, rivelis al la juĝisto la nomojn de tiuj entreprenistoj, kiuj al li pagis kvotojn porkoncesie. Tiamaniere la juĝisto, kies nomo, Antonio [Antonjo] Di Pietro, jam estas fama kiel tiuj de l' renomuloj sportaj kaj televidaj, sukcesis vastigi la enketon. Arestoj kaj akuzadoj-konfesioj sinsekvis kaj etendiĝis al pluraj urboj, kaj trafis membrojn de l' plej grandaj partioj. Ĝis nun la politikistoj enplektataj estas pli ol 200, kaj la entreprenistoj almenaŭ 130.

La enketo lumigis plurajn detalojn prikvote. Antaŭ ĉio, la tuta sumo de ĉiu kvoto estis antaŭfiksita: 5 % por konstrukoncesioj, 10 % por puriglaboroj, 15 % por laboroj de konservado. Multaj entreprenistoj, kiuj interkonsentis por partigi inter si la koncesiojn sen kvereli, pagadis kvotojn ne ĉar ili estis devigitaj, sed pro intereso: tio estas por nepre akiri koncesion, sen la danĝero alfronti la konkuradon. Plue, estis manieroj diferencaj pagi kvotojn. La maniero la plej naiva – kaj

la plej danĝera, pro la risko malkovriĝi – estis fizike liveri monon al politikisto. Iom pli ruza estis uzi peranton – kutime bienagenton – kiu ricevas monon kaj per malrektaj vojoj ĝin alvenigas al administranto. La plej senriska maniero estis cirkuligi monon tra „transversaj entreprenoj” konsistantaj el politikistoj, burokratoj kaj entreprenistoj. Vidiĝis tiel skandalo de publikaj konstruoj kiuj, menditaj je difinita sumo, post sennombraj retuŝoj kaj revizioj kostis multe pli, eĉ dekooble. Stadiono, kies antaŭvidita kosto estis 95 miliardoj, fine kostis 200 miliardojn. La kosto de strata interligo pasis de 29 al 350 miliardoj. Tiu de fervojo de 80 al 1800 miliardoj. Sed kiel, oni sin demandas, ĉu ne ekzistas kontroloj? La respondo estas: ne, ili ne ekzistas. Aŭ pli bone, ili ekzistas sed estas tute senefikaj. La revuo *Ekonomika Mondo* tiel priskribas la situacion: „La mekanismo de l' administrataj kontroloj en sia tuteco hodiaŭ ne funkcias. Kaj ĝi estas unu el la difektoj en burokratisma maŝino. La provoj koncentriĝas sur la valideco formala de l' decidoj, kun miriadoj da kontroloj, kiuj nur pezigas la procedurojn. Kontraŭe, neniu kontadas, por eltrovi kiom kaj kiel elspeziĝis. Precize tio estu la objekto de revizoroj: kontroli substance, ekzameni la atribudadon de koncesioj, ĉu la kostoj plimultiĝas, kaj kial. Necesus plie publikigi la aktualigo de la nunaj koncesioj”.

Kvoto kiel regulo


La glaciomonto de korupto, kies ĝis nun sole la pinto malmergiĝis, mirigas la civitanojn. La personoj koncernataj tamen miregas pro tiu mirigo. Kvotmoro, fakte, estas tiel difuza, ke ĝi fariĝis ‚regulo’. Regulo profita al ambaŭ partioj: kiu ricevas monon, riĉiĝas senzorge; kiu pagas, ne timos konkurantojn. Tio ĉi estas tiom vera, ke iu entreprenisto denuncas la ‚ĉantaĝon’ nur kiam li ne plu kapablas kvotpagi. La enketo „Puraj Manoj” precize ekis el entreprenisto, kiu ne plu havas intereson pagi kvoton, kaj tial denuncas la administranton kiu ĝin postulis. La ‚kvotregulo’ por akiri favorojn tiagrade enradikiĝis, ke disflugas la ideo, ke iaj kondutoj ne plu estas kondamneblaj, sed eĉ licaj, motivitaj, ĉar ili estas kutimaj, aŭ jam necesaj por

sukcesi kontraŭ konkurantoj. El tio sekvas ke ankaŭ honestuloj peliĝas al neleĝaj agoj, kaj senskrupululoj vidas konfirmita kaj akceptita ilian ‚kutilman’ nelican konduton.

Kiaj solvoj?

Dum plumarŝis la juĝista laboro, kiaj solvoj proponiĝas por kvietigi ĉi-ŝtormon? Kelkaj personoj, eble timigitaj de l' grandega korupto, petas pri ĝenerala amnestio por ĉiuj kulpuloj, ĉar alie oni riskos enkarcerigi grandan parton de l' politika kaj entreprena mondo en Italio. Aliaj proponas apartan senkulpiĝon por tiuj, kiuj publike konfesos sian kulpecon.

Ambaŭ solvoj, tamen, ŝajnas neadekvataj. Asertas ekzemple juĝisto: „Ambaŭ decidoj enfluas en pardonon; pardonon, kiun oni povos ankaŭ interpreti kiel ofendon al honestuloj, aŭ kiel implicitan rajtigon daŭrigi neleĝe”. Ŝajnas do pli juste kondamni la kulpulojn, eble kun punmalpliigo al tiuj kiuj redonas kiom ili fraŭdis, kaj promesas, kontraŭpune, ne plu eniri en la politikan vivon. ▶



Nomiĝas Kvotlando la nova ludo kiu rilatas al nuna koruptada skandalo en Italio. Kiu ludas kiel entreprenisto celas konstrui novan metroolinion. Kiu ludas la rolon de politikisto bezonas akiri 10 000 voĉojn. La ludantoj celas atingi sian objektivon pere de kvotoj, intersanĝante voĉojn kontraŭ koncesioj kaj terlotoj. Tamen ili devas atenti juĝiston, kiu obstaklas iliajn manovrojn. Kiel ajn, ili helpiĝas de „amiko en la ministrejo”, kiu laŭbezone sekuras sian rekomendon taŭgan.



Antonio Di Pietro, la juĝisto kiu funkciigis la enketon „Puraj Manoj”.

Pli vasta horizonto

Ne sufiĉas tamen halti ĉe puno de l' kulpuloj, kelkaj el kiuj nun atribuas la plej gravajn kulpojn al politikistoj kaj administrantoj kiuj, ‚malfeliĉe’, ne kapablas atesti, ĉar ili mortis de mallonge.

Necesas kompreni ke la kvotskandalo estas nur simptomo de pli grava malsano, kiu turmentas la socion. Tiu estas malsano, kiu aperas kiel egoismo, indiferenteco, timego. Necesas malfermi novajn perspektivojn. Tiel parolas ia episkopo de Milano: „Mi esperas ke ne fariĝu distingo inter malhonestuloj, ekstermindaj, kaj honestuloj, laŭdindaj. Ne estas tempo por sanktaj militoj... Estas socio kiu putris, kaj per si mem, ne per apero de Mesio, celu pliboniĝi. Futuro estas sur niaj manoj, se ni foriras el venĝa etoso. Ekbatis la horo sproni malfortulojn, timulojn, tiujn kiuj sin kaŝas pro timo malpurigi siajn manojn, aŭ turnas la kapon kiam okazas io”.

Paradokse, ĉi-okazaĵo tre malmulte edifa pruvis la grandan valoron de vera politiko, kaj ties urĝecon. Tiel verkis ĵurnalisto: „Ĉi tiuj faktoj utilas cele al ĝenerala moralreakiro rilate al la administracio: el tiuj fakte povos alveni forta puŝo rompi la maljustan ligilon inter politiko kaj aferoj, kaj decidi la partiojn al kuraĝa radikala renovigo de personoj kaj reguloj. Se la degenerado de l' publikaj institucioj komencis de ĉi tie, de ĉi tie komencu memkritiko severa kaj plenklara, sen kaŝi kulpojn kaj protektadojn. Nur tiuj partioj, kiuj kapablos tion fari, fariĝos denove kredindaj.”

Tiu estas programo kiu certe ne tuj plenumiĝos. Nek sen sufero. Kio tre necesas, kiel ajn, estas eki.

Gianfranco CAZZARO



Dum pluraj jardekoj la 7an de novembro en Litovio estis solene festata datreveno de la Granda Rusa Revolucio de 1917. Tuj post la resendependiĝo de Litova Respubliko tiu festo malaperis el la kalendaro. Tamen iuj studentoj decidis revekigi ĝin. Okaze de la 75a datreveno de la Ruĝa Oktobro en la stratoj de Vilnius ili iniciatis farsan manifestacion. Post kelkara paŭzo denove super la kapoj de la manifestantoj ekflirtis flagoj de Sovetia Litovio, reaparis portretoj de eminentaj partianoj, kaj estis prezentataj sloganoj laŭdantaj la komunistan partion. Inter la manifestantaro marŝis ankaŭ orkestro, kiu ludis ‚neforgeseblajn’ sovetiajn melodiojn. En tradicia manifestacia loko iuj ‚oratoroj’ prononcis ardajn vortojn asertante, ke la suno de la komunismo ankoraŭ ne subiris...

Laimius STRAŽNICKAS

opinio

Kiam trafos la verdikto Milosević?

Pasintjare gazetaro, radio kaj televido raportis pri la fakto, ke en pluraj latin-amerikaj urboj homoj amase protestis kontraŭ la festenoj de la kvincentjara jubileo okaze de eltrovo de Ameriko fare de Kolumbo. Tiu granda admirita kaj jubileita eltrovinto, kiel guberniestro en la „nova mondo” tie ordonis torturi, mutili kaj murdi homojn. Kaj en Usono nun, duonan jarmilon poste, oni faris al li „historian proceson” kaj „kondamnis” lin. Usonaj juristoj opiniis, ke tiu simbolaĵo estas necesa, ĉar la mondo devas vidi, ke krimoj ne restos sen puno.

La samaj amaskomunikiloj kiuj aprobe menciis la simbolaĵon, seke komunikis, ke en la estinta Jugoslavio la serboj denove faris fortan granatan pripafadon kaj bombardadon de bosniaj regionoj, kaj ankaŭ ke oni arestis en Graz, Aŭstrio, iun kuraciston, ĉar li dum la nazia reĝimo elektis 100 judojn por mortpafado.

Kial la serbaj potenculoj tiel longe povas daŭrigi siajn kruelajn teruraĵojn? Ĉu UN estas nur teatra organizaĵo aŭ reala, firma instanco? Kiam oni starigos Milosević antaŭ mondan tribunalon?

Gottfried HOFSTÄTTER

Hispanio liveras blukaskulojn

Ene de la agado de Unuiĝinta Naciaro (UN) por la pacgardado, Hispanio ekkunlaboris malfrue, ĝuste en 1989, sendante militistojn al Namibio kaj Angolo, kaj poste al Salvadoro kaj aliaj landoj. Pro la rezolucio de UN kiu permesas uzi ĉiujn necesajn rimedojn por certigi ke la humanisma helpo al Bosnio-Hercegovino atingu siajn celojn, la hispana parlamento decidis sendi tri ŝipojn kaj 400 homojn, ĉi-foje volontulojn, por partopreni kadre de la tiel nomataj 'blukaskuloj'.


Tiuj militistoj laboras sub ordonoj de naciaj militestroj sed ene de la Okcidenta Eŭropa Unio kaj kiel kontribuo al UNPROFOR (protektaj trupoj de UN). Vere Hispanio ekonomie estas la naŭa kontribuanto al la buĝeto de la blukaskuloj, kaj tamen tio ne korespondas al la malmultnombraj militistoj sendataj ĉar estas nur 149 hispanoj inter 55 777 membroj dissenditaj al konflikto-zonoj.

Jen la disdivido de tiuj operacioj kaj la hispana partopreno:

Salvadoro, kie estas observantoj de UN ekde 1991 konsistantaj el 1003 homoj, kun partopreno de 125 hispanoj.

Angolo, specifa misio de UN starigita en 1988 enhavanta 840 homojn inter kiuj 15 hispanoj.

Irako, observagado de UN ekde 1991 post la milito en la persa golfo, kun



Blukaskuloj laborantaj en Libano. Iliaj taskoj subite grandiĝis en pluraj partoj de la mondo.

500 homoj al kio Hispanio kontribuas ekonomie.

Saharo, misio pro referendumo, starigita en 1991 kun 375 homoj kiuj ankoraŭ ne povis resti en la teritorio.

Kampuĉeo, provizora aŭtoritato de UN konsistanta el 20 000 homoj en atendo de la estonta baloto por nova konstitucio. Hispanio kontribuas ekonomie.

Somalia, UN havas 3000 homojn, kiel kontribuon al distribuado de manĝaĵoj. Hispanio helpas finance.

Jerusalemo, starigita en 1948, UN havas tie 300 homojn.

Hindio, observantoj en Hindio kaj Pakistano, kun 300 homoj. Hispanio kontribuas ekonomie.

Libano, provizoraj trupoj de UN starigitaj en 1978 por kontroli la israelan retiriĝon.

Kroatio kaj Bosnio, protektaj trupoj kreitaj en marto 1992, kie partoprenas 20 000 homoj inter kiuj 400 hispanoj.

Hispanio en 1992 elspezis pli ol 8000 milionojn da pesetoj por kontribui al la pacagado de UN, eksterordinare granda sumo rilate la ekonomiajn eblecojn de la lando.

M.R.URUEÑA

IRLANDO

Nord-Irlanda senelirejo

Dum la tuta jaro 1992 daŭris en Belfasto, Dublino kaj aliaj kunvenejoj, konsiliĝoj inter reprezentantoj de la registaroj brita kaj irlanda, kune kun ĉefoj de la 'konstituciaj' politikaj partioj en Nord-Irlando, por trovi eblan solvon je la senĉesa malpaco en tiu regiono.

Partoprenis, inter aliaj, la oficialaj uniistoj (porbritaj monarĥistaj partianoj), sed ne plu la tiel nomataj demokratiaj uniistoj, kies korifeo estas la Rasputin-simila pastoro Ian Paisley [Pejzlej]. Ĉi tiuj rifuzas partopreni ĝis kiam la registaro de la Irlanda Respubliko okazigu referendumon pri du paragrafoj en ĝia konstitucio, kiuj deklaras, ke Irlando konsistas el la tuta irlanda teritorio, inkluzive de Nord-Irlando kaj de la apudaj marinsuloj. Kvankam la oficialaj uniistoj ne rifuzis ĉeesti la kunvenojn, ili ankaŭ postulas nuligon de tiuj paragrafoj. Siaflanke, la nord-irlandaj respublikanaj partianoj argumentas, ke estas maljuste postuli amendon de la irlanda konstitucio, sen samtempe trakti la britan pretendon, ke Nord-Irlando estas integra parto de la Unuiĝinta Regno. Ili timas krome, ke amendo de la konstitucio de la respubliko povus endanĝerigi ilian aktualan rajton posedi ir-

landan naciecon kaj pasporton de la respubliko.

Multaj homoj, kaj en Irlando kaj en Britio, pesimisme opinias ke la konsiliĝoj ne povos sukcesi sen partopreno de la politikaj aloj de la armitaj organizaĵoj respondecaj pri la kvazaŭmilita situacio en Nord-Irlando.

Intertempe, la brutalaj atencoj ne ĉesas...

GMA

LA MONDO EN JANUARO 1993

1a. ĈSFR dividiĝas: Ĉeĥa kaj slovaka respublikoj iĝas sendependaj ŝtatoj.

3a. Prezidanto de Kenjo, Moi, reelektiĝas.

3a. Bush kaj Jelcyn subskribas en Moskvo Start-2-konvencion pri redukto de nukleaj armiloj.

3a. Unuafoje ĉiuj konfliktopartioj en eksa Jugoslavio kune konferencas en Genevo.

3a. Perua parlamento refunkcias post 9monata interrompo.

4a. Kadre de Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj (KŜŜ) en Taŝkento formiĝas „Komunumo de Ŝtatoj de Meza Azio kaj Kazaĥio”.

11a. Registaro de Taĝikio lanĉas armean atakon kontraŭ la islama opozicio.

11a. Nova iraka atako kontraŭ la teritorio de Kuvajto.

13a. Usonaj, britaj kaj francaj militaviadiloj bombas raketbazojn en sudo de Irako.

13a. Eksa GDR-ĉefo Honecker estas liberigita kaj forflugas al Ĉilio.

14a. Dana ĉefministro Schlüter demisias. Rasmussen iĝas lia posteulo.

18a. Okcidentaj aviadiloj ree bombas militbazojn en Irako.

20a. Nova prezidanto de Usono, Clinton, oficiale enoficiĝas.

22a. Kroatoj lanĉas atakon kontraŭ la regiono Krajina, kontrolata de serboj. Tiuj ĉi agrese respondas ĉie en la militregionoj. Ankaŭ kroatoj kaj islamaj bosnianoj pafas unu kontraŭ la alia.

22a. Malsukcesa konferenco de Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj (KŜŜ) en Minsk: la organizaĵo disfalas pli kaj pli ĉefe pro la individuemo de Ukrainio, Moldovo kaj Turkmenio.

26a. Havel elektiĝas unua prezidanto de Ĉeĥa Respubliko.

27a. 9jara mallibereja puno por la vidvino de la iama KP-ĉefo de Albanio, Hoxha, pro misuzo de ŝtata mono.

MINORITATOJ

Kongreso junipera

La lastaj eventoj en orienta Eŭropo naskis novan ondon de nacikonscia reapero, kiel de tutaj popoloj tiel de apartaj etnaj grupoj. Tiu procezo tuŝis ankaŭ eksajn loĝantojn de okcidenta karpata montaro – lemkojn, kiuj estas la plej okcidenta branĉo de la ukrainia popolo.

Tiel okazis historie, ke lemka teritorio nun estas dispartigita inter tri ŝtatoj: Pollando, Slovakio (ĝis rivero Poprad) kaj Ukrainio (transkarpata provinco). La dua duono de la pasinta jarcento estis signita per ondo de amasa lemka migrado al Usono kaj Kanado. La plej malfeliĉan periodon travivis lemkoj en Pollando, tuj post la dua mondmilito. La tiama pola registaro ne interesiĝis pri evoluo de nepolaj minoritatoj etnaj. En la jaroj 1944–46 la plimulto da lemkoj (pli ol 200 000) estis forigitaj al Ukrainio. Tamen, pli tragedian sorton spertis la resto. Dum printempo de 1947 la pola registaro iniciatis la tiel nomatan agadon 'Wisla'. Armeanoj kaj policistoj brutale forpelis ĉ. 140 000 lemkojn al okcidentaj terenoj de Pollando (eksa germana teritorio). La lemka gepatra lando, Lemkujo, malpleniĝis kaj restis nur bruligitaj vilaĝoj kaj malhonorigitaj tombejoj. Malgaje lemkoj memoras tiun tempon...

Antaŭ du jaroj en Ukrainio lemkoj

fondis propran organizaĵon, kiu ĉi-jare aranĝis la unuan kongreson de lemkoj. Ĝi okazis en la urbo Ternopil, apud kiu nun loĝas plimulto el ukrainiaj lemkoj. Partoprenis tiun kongreson ĉ. 800 homoj el Germanio, Pollando, Usono, Kanado, Argentino, Rusio kaj, kompreneble, Ukrainio mem. Ilin unuigis branĉo de junipero, kiu estas simbolo de popolo, dispartigita de la propralanda arbo.

Dum solena inaŭguro la kongreson benis metropolito¹ Stefan – lemko el Filadelfio en Usono.

La kongreso turnis sin al la ukrainia parlamento kaj prezidanto, postulante politike taksu la lemkan portadon for de gepatraj regionoj. Ankaŭ oni proponis al pola registaro malaprobi agadon 'Wisla'.

Enkadre de la kongreso oni aranĝis festivalon de lemka kulturo. Partoprenis ĝin ĥoroj kaj solistoj el Ukrainio, Francio, Usono, same kiel poetoj el Argentino kaj Ukrainio.

Araneo

1. En ortodoksiaj eklezioj supera episkopo.



*Kantas
Maria Bajko,
profesoro
de la
Ivova
konservatorio.*



Elpaŝas lemkaĵ ĥoroj el Ukrainio.



Simbolo de la lemka kongreso.

Historio malkovrita

Dum trajna krozo, kiu inkludis viziton en Irlando, oficiroj kaj kadetoj de la argentina mararmeo ĉeestis solenan ceremonion en Foxford [Foksford] (irlande: Béal Easa [Bejl Asa]), eta urbo kie en 1777 naskiĝis admiralo Vilhelmo Brown [Braŭn] (irlande: de Bruin [de Brujn]) (1777-1857), heroo de la argentina sendependiĝa milito kontraŭ Hispanio, kaj fondinto de la argentina mararmeo.

La partoprenantoj ĉeestis senvualigon de busto de Brown, ornamita per la naciaj flagoj de Argentino kaj Irlando.

Kvankam tiu heroo estas rigardata kiel eminentulo en sia adopta lando, kie ĉefa strato en preskaŭ ĉiu urbo portas lian nomon, li estis ĝis nun efektive nekonata en sia naskiĝlando. Oni supozas, ke ekde tiu ĉi dato, li estos fama ankaŭ en Irlando. La ambasadoro de Argentino en la Irlanda Respubliko asertis, ke la vizito estis emocia sperto kaj vera 'pilgrimo' por la kadetoj. Iu observisto, John de Courcy Ireland [Ĝon de Kursi Ajrland], veterano tre respektata en irlandaj maristaj rondoj kaj iama Esperanto-instruisto deklaris, ke la internacia evento devus instigi irlandanojn pli alte taksi sian maristan heredaĵon.

GMA

Kiel trakti trakon?

Kiu veturas per fervojo povas observi, ke inter kaj apud la reloj plej diversaj plantoj kreskas laŭplaĉe. Sed ties sennombraj radikoj endanĝerigas la stabilecon de la reloj. Ĝis nun la germana fervojo procedis kontraŭ tiaj herbaĉoj per 300 tunoj da herbicidoj jare. Oni tamen serĉis pli konvenan vojon kaj kreis novan trajnon kiu nun estas prov-uzata sur aparte problemriĉaj linioj. En tiu trajno oni per likva gaso varmegigas mangan-platojn ĝis 900°C. Tiuj ekelsendas infraruĝan radiadon per kiu la proteinoj en la plantoj koaguliĝas, kaj ili pereas. La laborrapideco de la trajno troviĝas inter 1,5 kaj 4,5 km/h. Ĝi foruzas 100 litrojn da likva gaso en unu kilometro da trako. La vagonaro estas 50 metrojn longa kaj konsistas el trakciilo, laborvagono kaj cisterno-vagono kun akvo, por povi estingi eblajn fajretojn. La nova metodo kostas la dekoblon de la kutima herbicida.

Joachim GIESSNER

La kukisto de la ratoj

Bildrakontoj kaj filmoj prezentas simpatiajn ratojn kun larĝaj oreloj kaj longaj vosto, kiuj moviĝas en mondo fantazia. En la mondo reala, kontraŭe, la ratoj ne estas tiel amuzaj. Tre ofte ili eĉ fariĝas serioza problemo. Ili estas tre rezistaj; sciencistoj kiuj elŝipiĝis sur la atolojn, kie antaŭ jaroj eksplodis atoma bombo, eltrovis ununuran vivĉeeston en tiu arta dezerto: la ratojn, interdetrue bonfartajn kaj spritajn. Plue, ili estas multnombraj. En Italio estas 300 milionoj da ratoj, aŭ po kvin bestoj persone.

Tamen, ne ĉiu malbonaĵo plene malutilas, dirus Massimo Donadon [Mássimo Dónadón], proprietulo de Mayer [Majer] Braun, firmao provinca de Treviso [Trevizo], specialiĝinta pri raticidoj. Sed ne ajnaj raticidoj: veraj bongustaĵoj, kompreneble toksaj, je kiuj la ratoj estas precipe frandemaj. Komence de sia kariero Donadon sin demandis, kiajn manĝaĵojn frandas la ratoj, tiel ke li povos produkti raticidojn vere efikajn. Por tio li luis kvar malnovajn kampardomojn en diversaj regionoj, kaj tie pretigis verajn restoraciojn por centoj da ratoj. Tiel li eltrovis ke liaj 'klientoj' preferas kukojn: el kakao, el vanilo, el mandarino, eĉ el raspita plasto, aŭ el fiŝgluo... Tial Donadon ekproduktis venenitajn frandaĵojn tiugustajn. Nuntempe, lia firmao posedas enspezaron egalan al 15 miliardoj da liroj, kovras 30 % de l' vendado de raticidoj en Italio, kaj eksportas al Usono, Saudi-Arabio, Moskvo...

Estas eble ankaŭ pro tio – ke la ratoj



Massimo Donadon, kukisto de la ratoj.

lin riĉigis – ke Donadon sentas iun admiron al ili. Li diras mem: „Dum ĉi-jaroj mi multe lernis el la ratoj. Ili estas tre sociemaj; la plej maljunaj ekgustumas la unuaj la manĝaĵojn, por eltrovi, ĉu ĝi estas danĝera. Kaj ili ĉiam kunhelpas. Sume, ili klopodas manĝi, kaj agas kiel ratoj. Kaj mi, ilia kukisto, estas ja je iliaj ordoj, preta aranĝi miajn frandaĵojn la plej bongustajn”.

Gianfranco CAZZARO



IRLANDO


Birdmortigo

Kreskanta nombro da turistoj el Italio kaj aliaj landoj de la eŭropa kontinento vizitas la Verdajn Insulojn. Aparte bonvenaj estas nove geedziĝintaj paroj, kiuj tie pasigas sian mielmonaton. Multe malpli akcepteblaj estas eksterlandaj ĉasistoj, portante kvazaŭ milit-iran uniformon kaj pafilojn, kiuj invadas la pacan kamparon kaj mortpafas ĉiajn speciojn de bestoj kaj birdoj, inkluzive de kantbirdoj kaj protektita faŭno. Tiu kutimo estas tradicie rigardata en Irlando kiel abomeninda barbaraĵo. En sud-irlanda rivereto troviĝis, ekzemple, du grandaj sakoj plenaj de kadavroj de kantbirdetoj, laŭŝajne forĵetitaj de turistoj. En irlanda haveno, kiam doganisto devigis iun turiston malfermi sian valizon, elfalis kadavro de cigno, alia leĝe protektata specio. Komentis irlanda ĵurnalo: „Tiaj turistoj estas tiel bonvenaj kiel absceso sur la postaĵo”. GMA

EKOLOGIO

Ekologio en internacia kadro

En la rusa urbo Habarovsk estis fondita, en 1989, la Internacia Ekologia-Ekonomia Akademio (EKO). Ĝi estas tutmonda organizaĵo, al kiu rajtas aniĝi ĉiu esperantisto kiu okupiĝas pri mondekologiaj problemoj. La akademio celas per siaj centroj sur ĉiuj partoj de la planedo kolekti kaj registri ĉiujn informojn pri naturaj katastrofoj, aliaj ekologiaj fenomenoj, k.s., kiuj okazas senĉese, kaj kiuj aŭ dependas de, aŭ mem okazigas ekologiajn ŝanĝojn al la tera vivo. Uzante precipe la internacian lingvon Esperanto, EKO intencas konstati la tendencojn de la ekologiaj fenomenoj, kiuj fortege influas aŭ minacas la homan vivon. Per komputila registrado kaj sistemigado de la donitaĵoj, EKO provos krei futurologian prognozozon pri la ekologia estonteco. Sur tiu ĉi bazo, EKO celos aperigi bultenon ĉiujare. En 1991, EKO membrigis al la Ekologia Internacio de la Verda Kruco kaj la Verda Duonluno, kiu faras esplorojn pri la ozontruo. Hristo MARINOV



Dum la 91/92-jarŝanĝe okazinta rusa sesio de la Akademio Internacia de Sciencoj de San Marino (AIS) preskaŭ ducent homoj renkontiĝis en Moskvo kaj en Sankta Peterburgo (iama Leningrado) por kvalifiki kaj kvantigi la rilataron inter lingvo, kulturo kaj ekologio. Evidentiĝis, ke la teritorio kovrata de tiuj nocioj estas tre fekunda tensiokampo. Kaj la tre altnivelaj sistemteoriaj kaj la iom pli „praktikaj” prelegoj liveris abundon da diskuto pri la respektivaj difinoj de la nuntempo kaj la necesoj koncerne dece vivindan estontecon de niaj socioj. La materiaj kaj intelektaj polucioj estas egale venkendaj. Fakte, unuanimis la partoprenantoj el preskaŭ 50 nacioj, ke konscia tiucela aplikado de la internacia lingvo estas prioritato. La valoro kaj la estonteco de Esperanto certe estos taksata surbaze de ĝia taŭgeco ekologia, kaj surbaze de ĝia povo koncerne repaciĝon inter kulturo kaj naturo.

W. GUNTHER

Kontaktadreso:

AIS, sekretario, Kleinenberger Weg 16b, D-W-4790 Paderborn, Germanio.
 Centro „Lingvo-Kulturo-Ekologio”, V. Medvedev, pr. Mira 196-44, RUS-129128 Moskvo, Rusio.
 EKO Prezidanto, Prof. Dr. Hristo Marinov, ul. Ami Boué 51, BG-1606 Sofio, Bulgario. EKO Vicprezidantoj, Marthe Andreasson, Lilla Tolsereds Vag 2265, S-42542 Hisings Karra, Svedio; Odette Scheidl, 35 Grand' rue, F-67660 Betschdorf, Francio.
 EKO Gen. sekretario, Dr. Nagy Margit, H-6600 Szentes, Hungario, Kossuth ter 5. II. 7. EKO Sekretario, Mg. Danuta Waszkiewicz, ul. 1-go Maja 42/44 m. 54, PL-90-741 Łódź, Pollando.

POLLANDO

Atenco kontraŭ arbaro

Estas la 30a de aŭgusto. En la regiono Katowice en Pollando daŭre brulas la plej granda incendio en Eŭropo. Kulpas pro ĝi ne nur eksterordinara varmo kaj seko, kiuj dum plej parto de la somero turmentis la popolojn kaj damaĝis agrikulturon, sed ankaŭ la homoj mem.

La plej timiga efiko estas arbara incendio. Pollando ne estas riĉa je arbaroj. Plejparto el ili detruigis dum jaroj de malatentema pritrakto. Precipe mizere estas ĝuste en la regiono Katowice.

Kiel centro de industrio, la urbo troviĝas en ekologia danĝero: ĉiuj normoj de toksikaĵoj jam trapasiĝis. Ne sufiĉas oksigeno produktata de malmultaj verdaĵoj, kaj 55 % de mortoj estas kaŭzitaj de sangomalsanoj, dum 20 % de kancero. Nun, dum kvin tagoj pereis 10 mil hektaroj da arbaro, pro incendioj okazigitaj en 60 % el la kazoj intence de homoj! De homoj celantaj... nu kion? Aleksandra WATANUKI

Viajn kontribuojn por la rubriko „medio” sendu al:

Timothy B. Carr
 Gordon House
 211 Bedford Street
 Crewe, Cheshire
 Britio CW2 6JL

ARKEOLOGIO

Antikva Baktrio: mito kaj realo

La Antikva Baktrio, unika histori-kultura regiono situanta laŭ ambaŭ bordoj de Amudarjo-rivero sur la teritorioj de la nuntempaj suda Uzbekistano, sud-okcidenta Taĝikistano kaj norda Afganistano, atestis tumultajn historiajn eventojn. Laŭ legendo, ĝuste sur la baktria tero geedziĝis la fama carino Semiramida kaj la asiria reganto Nin. Ĉi tie trapasis la trupoj de Aleksandro la Granda kaj Ĉingisĥano, kaj ĉi tie Tamerlano atingis sian povon. Jam al la antikvaj grekoj kaj persoj, Baktrio estis konata kiel „lando de miloj da urboj” kun militema, liberama popolo „kun alte levitaj standardoj”.

Tamen, multjarcenta silento limigis niajn sciojn pri la plej antikva historio de la baktria civilizo al fragmentaj sciigoj kaj legendoj en la verkoj de la antikvaj historiistoj. Finfine, dum la dua duono de nia jarcento, danke al la sensaciaj arkeologiaj malkovroj, tiu ĉi tero „ekparolis”.

La fontoj de la antikva baktria civilizo troviĝas en la dua miljaro a.K., kiam ekestis la loĝ-agra kulturo Sapalli-Daŝli, en kies loĝlokoj, Sapallitepa, Garkutan, Daŝli, unuafoje en la antikva Baktrio estis konstruitaj la monumentaj temploj kaj palacoj, kiuj formis la bazojn de la urba vivo kaj religia ideologio.

Majstroverkoj de la monda arto sendube estas ankaŭ la monumentoj de la kulta budhisma arkitekturo de la dua jarcento antaŭ Kristo ĝis la dua jarcento post Kristo (Kara-tepa, Fajaz-tepa, Halĉajan, Dalverzin, Kampir-tepa, Ajrtam, kaj multaj aliaj). Inter ili aparte elstaras la antikvaj budhismaj monaĥejoj Fajaz-tepa kaj Kara-tepa kun la riĉaj templaj arkitekturo, skulpturo kaj surmura pentroarto.

En unu el la plej grandaj centroj de la antikva Baktrio, Dalverzin, estas trovitaj la monumentaj placaj-templaj konstruaĵoj, diversspecaj statuoj de budhoj, oraj trezoroj, nekropoloj, k.a.

Dum jarcentoj la tero de la antikva Baktrio ne ĉesis allogi misiistojn de diversaj religioj (zoroastriismo, budhismo, maniĥeismo, kristanismo, islamismo, k.a.). Danke al la avantaĝa geo-politika situo, en Baktrio troviĝis la gravaj transitaj centroj de la Granda Silka Vojo, kie okazis grandiozaj negocadoj inter Oriento kaj Okcidento.

Nuntempe, la antikva Baktrio transformiĝis je valorega scienca laboratorio por la esplorado de la historia kaj kultura heredaĵo de la popoloj de la Meza Oriento.

Vladimir IONESOV

ALTERNATIVA MEDICINO

Fakrevuo elektas Esperanton

Per sia numero 1/1992, la brazila revuo *Pesquisa Homeopática* unuafoje aperas dulingve, en la portugala kaj en Esperanto. Izaac Carneiro Soares, la prezidanto de la eldonanta asocio IHFL, klarigas en sia antaŭparolo, ke tiel la revuo estigas „la realan sciencon interkomunikiĝon trans limoj” kaj asertas ke „tiu entrepreno estas sekunda de aliaj institucioj”.

Ĉiuj kontribuoj estas presitaj dukolumne kun paralelaj tekstoj en la du lingvoj. La internacilingvaj tekstoj estas ĝenerale en tre bona stilo. La tradukoj estas faritaj de la eldonistoj mem, kio estas afero tre nekutima en sciencaj revuoj kaj atestas pri la forta engaĝiĝo de Neusa Priscotin Mendez, kiu respondecas pri esperantigo de la tekstoj. Principe, do bonega ŝanco por Esperanto-parolantaj homeopatoj, kiuj nun povos interŝanĝi fakajn informojn kaj spertojn kaj evoluigi sian terminologion.

Ŝajnis ja taŭge enkonduki la dulingvecon okaze de la dekjara jubileo de IHFL. Tamen, la rezulto estas revua numero tute sen iuj fakaj kontribuoj, ĉar 70 paĝoj raportas pri la historio de la instituto ekde ĝia fondiĝo en 1982. Kvankam tiuj raportoj prezentas lingve bonan legaĵon kaj certe gravas por historiaj celoj, ili ne tre stimulas eksterulojn al legado...

Necesos do atendi la sekvantan numeron por vidi, ĉu la promesplena komenco de la dulingva eldonado sukcesas konservi sian energion pri fakaj redaktado kaj eldonado. Por tio necesas precipe, ke homeopatiaj fakuloj ekster Brazilo uzu la ŝancon kontribui en Esperanto al PH-HE. Nur se tio sukcesos, la entrepreno povos, laŭ la supre esprimitaj esperoj, fariĝi modelo por aliaj institucioj.

Reinhard FÖSSMEIER

Pesquisa Homeopática („Homeopatia Esplorado”) – januaro/junio 1992, volumo 7, n-ro 1 – Instituto Homeopático François Lamasson, Ribeirão Preto, Brazilo – 8+72p. -- ISSN 0103-0035. Abonebla ĉe: Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, CEP: 70084-970 Brasilia (DF), Brazilo. La jarabona kotizo egalas al 50 NLG, kio rajtigas ricevi ankaŭ la (same dulingvan) bultenon de la Homeopatia Muzeo Abrahão Brickmann.



Ceramikaĵoj de la malfrua bronza epoko el antikva Baktrio (fino de la dua jarcento a.K.).

Birda poliandrio

La fenomeno, ke femalo rilatu kun multaj maskloj jam delonge ekzistas inter birdoj. Ekzemple, femalo de la nordaj jakanoj el norda Meksiko povas havi samtempe eĉ kvar edzojn, kaj kapablas kopulacii kun ĉiuj kvar ene de unu horo. Kvankam ambaŭ gepatroj 'konstruas' la neston, la femalo nur ŝajnigas laboron tiurilate. Ankaŭ la kovadon prirespondas la masklo. La plimulto de 'edzinoj' ne alproksimiĝas al la nesto. Nur minaco de danĝero elvokas en ili helpdeziron. La patrino tute ne interesiĝas pri la idoj, kvankam ŝi pasigas la plimulton de la tempo apud ili, gardante kontraŭ malamikoj. La patro devas prizorgi kaj nutri la birdidojn.

La masklo de tiu specio estas malpli granda kaj pezas nur ĉ. 90 gramojn; la femalo preskaŭ duoble, ĉ. 160 gramojn. Tial, ne estas mirinde, ke li ne povas sin defendi antaŭ ŝia atakemo. La devo de la femalo estas defendi la teritoriojn de ĉiuj siaj 'edzoj' antaŭ aliaj femaloj.

Ĉar poliandrio estas tipa por la femaloj de tiu specio, ili estas pli fortaj, pli kuraĝaj, kaj havas pli okulfrapan koloron. La masklo tuj submetiĝas al la femalo, kiu forpelas el lia teritorio aliajn konkurantinojn. Li havas neniun rajton, ĉar nur femaloj decidas, pere de bataloj, al kiu li apartenas. Ankaŭ la femaloj de la argentinaj strutoj kondutas 'virece'. Dum unu sezono ili povas generi laŭvice kun diversaj 'edzoj'.

La maniero prizorgi la idojn ŝajnas foje determini la interseksajn rilatojn inter birdoj. Se la patrino kovas la ovojn kaj prizorgas la birdidojn, ŝia kunulo estas aŭ monogamia, kiel ĉe anasoj, aŭ poligamia, kiel ĉe la plimulto de birdoj. Tamen, kiam la masklo alprenas gepatrajn devojn, la femalo povas esti fidela al li, aŭ, se la naturo dotis ŝin per grandaj generkapabloj, ŝi elektas poliandron.

La tasmana kokino samtempe rilatas kun almenaŭ du maskloj, plej ofte la fratoj. La birdoj vivas en disvolvigitaj familiaj grupoj, okupiĝantaj komune pri ĉiuj nestoj kaj birdidoj, kiuj troviĝas sur difinita teritorio. Ĉiuj fratoj kopulacias kun la femalo, tamen, unu el ili faras tion pli ofte ol la aliaj. Similan fratan poliandron praktikas la perdrikoj kaj la tinamoj. Inter la lastaj, kelkaj fratoj havas unu komunan femalon, kaj ŝi devas prizorgi la tutan idaron!

Alicja A. BERNATOWICZ

Materialo kun grandega varmizolado

Estas bone konate, ke ŝaŭmmaterialoj izolas la varmon relative bone, ĉar la aero en la poroj kondukta la varmon nur malbone. Eĉ pli avantaĝaj en tiu rilato estas pezaj gasoj, kiaj fluor-klor-karbonoj, per kiuj ĝis nun estas plenigataj alte izoladaj ŝaŭmoj (kemie: poliuretano). Pro la danĝero kiun tiu prezentas por la ozontavolo, oni nun devas anstataŭigi la klorhavajn gasojn. Ekzistas, tamen, ankoraŭ aliaj izolmetodoj.

Kutime oni taksas vakuon absolute perfekta varmizolilo, ĉar ĝi ne enhavas materion por transporti la varmenergion. Sed tiu energio estas transportata ankaŭ per radiado. Ĉe normalaj temperaturoj, tiu 'varmece' radiado estas infraruĝa, do ne videbla. Nur ĉe kelkaj mil gradoj oni rimarkas ĝin; estas la ardado de varmegaj korpoj. Por malebligi tiun transporton, oni konstruis superizolaĵon kiu konsistas el mantelo vakua, kiu enhavas multajn metalajn foli-strietojn por malebligi la pasadon de la radioj. Tio estas la plej bona izolaĵo ĝis nun farita. Sed ĝi estas relative multekosta, kaj pro la vakuo bezonas fortikajn vandojn.

Malpeza solvo

Ĉu oni povas vakuigi ankaŭ la porojn de ŝaŭmo, sen bezoni tro dikajn vandojn? Tio estas ebla, sed ekzistas eĉ pli interesa ebleco: la necesa kvalito de vakuo estas des pli malalta, ju pli malgrandaj estas la poroj. Ĉe pordiametro dekfoje pli malgranda ol la ondolongo de la lumo, sufiĉas eĉ normala aerpremo en la poroj. Pro ilia malgrandeco, la poroj ne estas videblaj. La materialo povas esti tralasebla (sed prefere ne por infraruĝaj radioj). Por atingi kiom eble plej malgrandan varmokondukton, necesas redukti la kontribuon de la solida materio. Tial la vandoj de la poroj devas esti laŭeble plej maldikaj, tamen fortikaj. La ŝaŭmo estu laŭeble malpeza, tamen portipova.

Por realigi tiun celon, fizikistoj jam frue provis anstataŭigi la solvanton de ĝeloj per aero. (Ĝeloj konsistas el grandegaj molekuloj, solvitaj de akvo aŭ alia solvanto, kiu estas distribuita kiel poroj en spongo.)

Komence, ĉiu provo vaporigi la akvon igis kolapsi la ĝelon, ĉar dum la vaporigo la poroj estas nur parte plenaj, kaj la surfaca tensio de la akvo tial tiras ĉe la vandoj kaj kolaps-

igas ilin. Antaŭ 15 jaroj, francaj esploristoj vaporigis la solvaĵon ĉe ĝia kritika punkto, kaj sukcesis. Ĉe tiu punkto ĉiu diferenco inter likvaĵo kaj gaso aŭ vaporo malaperas, inkluzive de la surfaca tensio. Ĉar la kritika punkto de akvo troviĝas ĉe tro altaj temperaturo kaj premo, oni uzis alian solvaĵon, nome metanolon aŭ karbon-dioksidon. La rezultantaj aerplenigitaj ĝeloj estas tre malpezaj – ĉ. 100 kilogramoj per kuba metro – kaj iom travideblaj. Ilia varmkondukto povas esti malalta ĝis 0,013 ŭatoj per metro kaj kelvino ($W m^{-1}K^{-1}$), t.e. triono de la kondukto-povo de la konata blanka polistiren-ŝaŭmo kaj 1,5foje pli malalta ol tiu de bruna poliuretano plenigita de fluorklorkarbono.

Organika aeroĝelo solvas

Komence, tiuj materialoj estis farataj per SiO_2 -ĝelo, kies kristala formo estas nomata kvarco. Kvarco estas tre malmola, sed rompiĝema kiel vitro kaj same la menciita ĝelo estas rompiĝema. Tiun problemon oni lastatempe solvis per organika aeroĝelo. Grupo gvidata de J. Fricke [Fricke] en la universitato de Würzburg [Würzburg], Germanio, kunlabore kun J. Pekala, usona esploristo, sintezis ĝelon el fenolrezino, kunverŝante malkoncentritajn solvaĵojn de resorcinolo (dihidroksobenzeno) kaj formaldehido (konata fenolrezino estas bakelito, unu el plej fruaj plasto.) Post sekigo rezultis ruĝa aeroĝelo fleksebla, kun varmkondukta kapacito de $0,012 W m^{-1}K^{-1}$. Tio estas ĝis nun la plej efika varmizolkapablo atingita sen vakuo. Eĉ plia bonigo je faktoro 2 estas ebla, se oni uzas modestan vakuon de 10 milibaroj.

La nova ĝelo povas diversmaniere utili. Tamen, unue necesas regi la sekigan proceduron, kiu postulas premon de 80 baroj – la kritika premo de karbondioksido. Tiu postulo ĝis nun limigas la grandecon de aeroĝeltabuloj al malpli ol unu kvadrata metro, kaj cetere ĝi kostas multe.

Werner FUSS

Viajn kontribuojn por la rubriko „scienco” sendu al:
Krys Ungar
„Verdejo”
59 Furlong Avenue
Arnold, Nottingham
Britio NG5 7AS

GERMANIO

„Treuhandanstalt“

Unuigi du ŝtatojn kun tute diferenca politika kaj ekonomia sistemo, tio estas giganta tasko. Ĝi estiĝis el la politika evoluo de la jaroj 1989/1990 en meza Eŭropo. Temas pri la „du Germanioj“, kiuj dise estis evoluigintaj dum la 45 jaroj post la dua mondmilito. Ĉi tie la okcidenta Federacia Respubliko Germanio (FRG) kun loĝantaro de ĉ. 60 milionoj kaj areo de 248 000 km², kun sociala merkatekonomio, enordigita en la okcidenta mondosistemo, membro de NATO (Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo) kaj ekonomie enplektita en la Eŭropa Komunumo. Tie la orienta Germana Demokrata Respubliko (GDR) kun loĝantaro de ĉ. 16 milionoj kaj areo de 108.000 km², kun socialisma ekonomia sistemo kaj tutpopola proprieto, membro de iama Varsovia Pakto, politike totale dependa de la tiamaj potenculoj en Moskvo, per netralasiva murego kaj dorndrata limo disigita de la okcidentaj gefratoj.

Baldaŭ post la revolucia ŝanĝo fine de 1989, komence de 1990 evidentigis, ke la homoj en GDR strebis al unuiĝo de ambaŭ ŝtatoj surbaze de la libera okcidenta sistemo. Sed kiel solvi ĉi tiun problemaron? Kiel malŝtatigi la produktajn rimedojn, la popolproprietajn entreprenojn, la agrikulturajn kaj metiistajn kooperativojn, la aliajn posedaĵojn, kiujn la ŝtato GDR ekde 1949 estis forpreninta de privatuloj aŭ kiujn ĝi mem estis nove kreinta? Al kiu doni tiujn posedaĵojn, je kiu prezo?

Por solvi la transigajn problemojn de popola al privata proprieto, la Volkskammer [Folkskamer] (parlamento de GDR) voĉdonis jam je la 1a de junio 1990 leĝon pri Treuhandanstalt [Trojhandanstalt]. Tiu leĝo validas nun ankaŭ en la unuiĝinta Germanio.

„Treuhand“ signifas laŭvorte „fidela mano“, kaj metafore „fidela prizorgo“ (pri iu ricevita aĵo). En Esperanto ekzistas por tio la vorto „sindiko“. *Treuhandanstalt* (Sindika Instituto, organizaĵo laŭ publika juro) fariĝis kvazaŭ la ŝtata holdingo por ĉiuj popolproprietaj de la iama GDR. Laŭ la leĝo, ĝia tasko ne estas, ke ĝi funkciigu siajn subigitajn entreprenojn, eĉ ne plinombriĝu aŭ malŝtatigu tiujn, sed male: ke ĝi malsocialigu ilin, do forvendu ilin al privataj investantoj je kiel eble plej alta prezo. Kiam la lasta entrepreneto kaj ŝtata havaĵo estos forvendita, tiam Sindika Instituto (SI) estos plenuminta sian taskon kaj per tio meritplene povos malfondiĝi.

Programo kaj strukturo

Konforme al la leĝo de la 1a de junio 1990 SI plenumas siajn taskojn laŭ programo komune starigita de la federacia registaro, de la registaroj de la federaciaj ŝtatoj (ekzemple Sakso, Turingio) kaj de la estraro de SI. Ĝi servu al privatigo kaj utiligo de popolpropria laŭ la principoj de la sociala merkatekonomio. Ĝi helpu al alĝustigo de la ekonomiaj strukturoj al postuloj de la merkato, t.e. antaŭ ĉio transformo de grandaj uzinaroj al merkativaj entreprenoj mezgrandaj kaj malgrandaj.

Sindika Instituto raportas al administra konsilio (similas al kontrolkonsilio de akcia kompanio). Krome ĝi estas subigita al la federaciaj ministroj pri financo kaj ekonomio kaj finfine ankaŭ la Bundestag [Bündestag] (germana federacia parlamento) havas kontrolrajton. La decidoj, kiujn faras SI, tuŝas ankaŭ la regionojn en orienta Germanio, en kiu situas la koncerna entrepreno. Tial nepre necesas kunlaboro kaj interkonsento kun registaroj de federaciaj ŝtatoj, distriktaj kaj komunumaj administracioj kaj aliaj regionaj instancoj.

La ĉefsidejo de SI estas en Berlino, plie troviĝas 15 filioj dise en orienta Germanio. Naŭ estraranoj responsas laŭ ekonomiaj kaj industriaj branĉoj. Grandaj entreprenoj estas traktataj de la ĉefsidejo, la aliaj de la filioj.

La laboro komenciĝas

La laboro de Sindika Instituto komenciĝis per transformo de pli ol

dek mil ekonomiaj formitaĵoj (entreprenejoj, kombinatoj, fabrikoj, uzinoj, produktadaj kaj metiistaj kooperativoj) al AK (akcia kompanio) aŭ KLR (kompanio kun limigita respondeco). Je la 1a de julio 1990, la tago de la enkonduko de la germana marko (DEM) en GDR, ĉiu AK kaj KLR devis taksii siajn havon kaj ŝuldon kaj establi malferman bilancon en la valuto DEM. Poste SI kune kun bilancrevizoroj kontrolis tiun malferman bilancon kaj la entreprenan agadkoncepton. Sekvis prijuĝo de la ŝancoj de tiu kompanio por transvivo en libera merkato. Post ĉi tiu prijuĝo SI devas fari sian decidon laŭ la memordonita principo: rapide malŝtatigi – decide restrukturi – atente fermi!

Granda problemo antaŭ definitiva decido estas esploro pri ekzisto de legitima iama posedinto el antaŭaj tempoj, kiu povas pravi sian pretenon. Temas ekzemple pri personoj, kiuj estis senposedigitaj, ĉar ili estis forlasintaj GDR-on antaŭ la 1a de junio 1955, la dato de la unua ribelo en GDR; aŭ pri personoj, kies entreprenon la GDR-registaro devige transformis en tutpopolan proprieton, kio okazis dum la ondo de ŝtatigo en la jaro 1972.

Tiaj personoj ricevos sian propran. SI devis trakti kaj prijuĝi pli ol 13000 da tiaj pretendoj. Ĝi intertempe finis la esploron en 6356 kazoj, do en la duono de ĉiuj pretendoj; el tio en 3938 kazoj oni redonis la entreprenon al la iama proprieto. Sed tiu ricevas la entreprenon nur, se li kapablas pli funkciigi ĝin. En nea kazo, kaj se nova investanto pretus sufiĉe investi kaj sekurigi laborlokojn, la iama proprieto ricevas de SI nur monan kompensadon.

Rapide malŝtatigi

Sindika Instituto precipe provas malŝtatigi la entreprenon, t.e. forvendi ĝin al privata investanto. Por tio SI stimulas konkuron inter potencialaj interesuloj por atingi maksimuman prezon. La alteco de tia prezo dependas de la „vera“ valoro de la entrepreno, do de la kvalito kaj merkataj ŝancoj de ĝiaj produktoj, de la stato de konstruaĵoj kaj maŝinaro, de ebla poluado fare de la fabriko, de la sumo de ŝuldoj, k.s. Tio ofte signifas, ke SI devas „forvendi“ la entreprenon je la simbola prezo de 1 DEM, kio karakterizas la malefikecon kaj kadukecon de la GDR-industrio. Ĝenerale SI vendas aŭ donas entreprenon al tiu interesulo, kiu krom

pagon de konvena prezo garantias plej bonajn kondiĉojn por la entreprenon. Tiuj estas ekzemple promesplena merkata koncepto, bona manaĝado, abunda provizado pri moderna tekniko kaj alta investado por sekurigi kiel eble plej multajn laborlokojn. Si ankaŭ povas provizi krediton al la akiranto kaj garantion, kiu estas sekurigita de la federacia registaro.

Ofte kaj prefere Si vendas entreprenon aŭ entreprenparton al ĝisnunaj gvidaj personoj de tiu entreprenon (almanaĝera vendo, angle: *management buy out* [meneĝment baj aŭt]). Ĝenerale ĉiuj interesuloj devas esti egalrajte traktataj de Si. Eksterlanda aspiranto havas samajn ŝancojn kiel germana. Fakte ĉirkaŭ dekono de la entreprenoj ĝis nun estis venditaj al negermanaj investantoj, el tiuj unuarange francoj.

Si kontraktas kun la akiranto, ke tiu promesu difinitan investosumon kaj sekurigon de certa kvanto da laborlokoj. La investanto ne rajtas plu vendi la entreprenon akiritan de Si. Se li tamen faras tion, li devas pagi al Si eventualan plusvaloron. La akiranto rajtas esti libera de responso pri poluadaj damaĝoj estiĝinta antaŭ la 1a de julio 1990. Ĉe konsiderinda damaĝo oni povas kontrakte reguli la dispartigon de la risko. Plie, se la investanto ne plenumas la kontraktitajn devojn, li devas redoni la entreprenon.

Decide restrukturigi

En kazo ke ne venas interesuloj, kaj se la fakuloj de Sindika Institucio rigardas la entreprenon sanigebla kaj vivokapabla, ĝi estas provizore daŭrigata sub la tegmento de Si. La kostojn pro restrukturigo kaj ebla deficito el la produktado transprenas Si. Ĉefa celo estas ĉe tio la konservado de laborlokoj. Alikaze la dungitoj fariĝus senlaboraj, kaj por ili la senlaborula subvencio supozeble estus pli alta ol la kostoj de malefika produktado.

Atenteme fermi

Se entreprenon ne havas iun ŝancon por transvivo, ĉar la produktado estas malefika kaj ne konkurkapabla, aŭ ĉar necesa investo estus tro alta kaj ne redimenta, Sindika Institucio decidas fermi la fabrikon. Kompreneble la kostojn pro fermo, malkonstruo, forigo de poluaj damaĝoj k.s. transprenas Si.

Rezultoj kaj konsekvencoj

El la apuda tabelo pri la nombro de entreprenoj traktitaj de Sindika Institucio oni vidas, ke dum nur 2 1/2


Evoluo de Treuhand-entreprenoj

Totala nombro de entreprenoj je 92-11-30		11785
privatigoj		6468
entreprenoj tute privatigitaj	4784	
entreprenoj pli ol duone privatigitaj	543	
entreprenpartoj privatigitaj	(5043)	
entreprenoj tute reprivatigitaj	1141	
entreprenoj transdonitaj al komunumoj		323
likvidoj		2081
likvidoj en traktado	2052	
likvidoj finitaj	29	
Entreprenoj ankoraŭ privedicidotaj		2913

jaroj Si decidis pri pli ol 10000 entreprenoj. Restas nur 2913 entreprenoj ankoraŭ ne privediciditaj je la fino de novembro 1992. Oni ne povas ne aprezi ĉi tiun faron. Kompreneble Si ricevis multe da kritiko el la popolo. Por kelkaj Si negocis tro longe pri iu entreprenon kaj per tio perdis ŝancon pri rapida prospero. Aliaj opiniis, ke Si fordonas entreprenojn je tro malalta prezo kaj per tio disdonacas tutpopolan proprajon. Sed tiu tasko de Si, giganta kaj unika, sen iu precedento, ne povas esti farata laŭ ĉies plaĉo. Oni devas koncedi al la unua prezidanto de Si, Detlev Rohwedder [Detlev Roveder] antaŭ du jaroj murdita – kaj lia posteulo, Birgit Breuel [Brojel], ke ili unue devis elpensi regularon kaj metodojn por tia tasko kaj dungi taŭgajn kunlaborantojn ekonomie edukitajn. Poste ili rapidege agadis laŭ siaj celoj.

Fina bilanco

La leganto eble demandas sin, ĉu Si fine havos pozitivan aŭ negativan bilancon. El la supre skribita li/ŝi ja scias, ke Si havas enspezojn el la vendado de entreprenoj. Aliflanke ĝi devas preni sur siajn ŝultrojn deficitojn de fabrikoj sub ĝia responso, kostojn por fermi entreprenojn, forigon de polua damaĝo, kompensadojn al iamaj proprietuloj, transprenitajn malnovajn ŝuldojn, interezojn, salajron al siaj kunlaborantoj k.s. El la hodiaŭa rigardo, Si kalkulas ĝis meze de 1994, kiam ĉiuj entreprenoj estos privediciditaj – deficiton de ĉ. 250 miliardoj da DEM. Je la komenco, do meze de 1990, oni atendis profiton de 600 miliardoj da DEM. Sed baldaŭ poste evidentiĝis, ke la fabrikoj en iama GDR estis en tiel terure kaduka stato kaj ke la medio-damaĝoj pro senlima poluado estis tiel kolosaj, ke, antastataŭ ricevi altajn vendoprezojn pro malŝtatigitaj entreprenoj, Si devis elspezi pli da mono pro damaĝoj. Pliakriĝis la situacio en orienta Germanio pro la



elfalo de eksporto al orienta Eŭropo ekde 1992 sekve de totala ekonomia malprospero en iama Sovetunio kaj en la aliaj eksksocialismaj landoj (vidu grafikaĵon).

Do *Treuhandanstalt* havas nun kreskantajn ŝuldojn, kiuj estas garantiataj de la germana ŝtato. Temas pri ŝuldoj de la tuta popolo de la unuiginta Germanio, do amara frukto de ĉiam sopirita reunuiĝo. La federacia registaro pensas pri aldona imposto por redukti la ŝtatajn ŝuldojn. Post la kortuŝaj eventoj kaj mielmonatecaj renkontiĝoj inter okcidentaj kaj orientaj germanoj fine de 1989, oni troviĝas nun en stato de senreviĝo. Sed la germana popolo ne havas alian eliron ol ŝpari kaj diligente labori kaj fari ĉiujn eblajn aranĝojn por ebenigi la malsamajn vivoniveleojn en la okcidenta kaj la orienta partoj de sia lando.

Franz J. BRAUN

Kontribuojn por la rubriko „ekonomio” vi sendu al:

Roland Rotsaert
Visspaanstr. 97
B-8000 Brugge
Belgio

UKRAINIO

La kristala kaverno

„Eĉ guto malgranda, konstante frapante traboras la monton granitan”. En la provinco Ternopil (Ukrainio) apud la urbeto Borŝĉiv troviĝas la dua kaj kvara kaverno pro sia longeco en la mondo — ili estas la unua kaj la tria en Eŭropo — kiuj estas samtempe la plej longaj gipsaj kavernoj. Ili nomiĝas *Optimisma* kaj *Eluetaj Lagoj* (longeco 143 kaj 136 km). Apude troviĝas ankaŭ *Kristala Kaverno* (vilaĝo Krivĉe) kun suma longo de ĉiuj koridoroj de ĉ. 22 km. Ĝi estas la plej longa el ĉiuj turisme viziteblaj kavernoj en Eŭropo, ĉar 3,5 km estas lumigitaj.

Kvankam la suma longo de ĉiuj koridoroj estas 22 km, la tuta areo de tiu kaverno estas nur proksimume kvarono de kvadrata kilometro. Tio pruvas, ke la subsurfaca labirinto estas tre densa.

La unuaj sciigoj pri *Kristala Kaverno* datumas el 1721. Nur en 1933 inĝeniero Neĥaj publikigis la unuan skeman planon de ĝia ĉefa parto, kun suma longo de koridoroj 3,5 km. Tiam komencis veni unuaj unuopaj turistoj. Amasa turismo tiam ne ekzistis. Ili venadis ne nur el Pollando, al kiu tiam apartenis la regiono, sed ankaŭ el Rumanio, Germanio, Francio... La turistojn gvidis loka loĝanto de vilaĝo Krivĉe, s-ro Mironjuk. Lia filo ĝis nun laboras kiel profesia ĉiĉerono.

Dum la jaroj de la dua mondmilito la enirejo estis malkonstruita. Nur en la jaro 1961 junaj ternopilaj speleologoj denove malfermis ĝin. Dum la jaroj 1961-63 la kaverton detale trastudis kompleksa ekspedicio de la scienca akademio de Ukrainio, kiun estris doktoro pri geologio Dublanskij. Tiam estis farita pli detala plano (en skalo 1:500) de la tuta tiam konata kaverna labirinto, 18 km longa.

Dum la ekspedicio oni trovis ĉ. 500 ostojn de iamaj kavernaj bestoj kaj restaĵojn de ilia nutraĵo. Oni precizigis 40 diversajn speciojn. Inter ili estis rangifero (boaco, norda cervo). Nun en tiu kaverno loĝas nur vespertoj.

Ekzistas praktike nur unu enirejo. Antaŭ nelonge speleologoj trovis kvarkilometran daŭrigon de la subsurfaca labirinto kun dua enirejo, sed tiu dua enirkoridoro estas tiel malfacile trairebla, ke tra ĝi ĝis nun

sukcesis rampi nur tre spertaj speleologoj.

Ĝi havas multajn senelirejojn. Estas tre facile perdiĝi kaj pereii. Unu el ili, en kiu oni trovis skeleton de junulo, nomiĝas „Senelirejo de l' skeleto”. Tial oni bezonas spertan ĉiĉeronon por ne krei novan „skeletan” senelirejon.


La temperaturo tie estas konstante + 11° C; la aero estas tre freŝa kaj tre pura. En la partoj nevizititaj de homoj la aero estas eĉ preskaŭ sterila. La kaverno interesas ankaŭ la medicinistojn. Ili supozas, ke la ĝia mikroklimato povas helpi sanigi diversajn malsanojn, precipe astmon.

Interalie, vundoj tie pli rapide resaniĝus ol surtere.

Speciale agrable estas spiri en la kristalkavernaj partoj. En kristaloj troviĝas la joniganta elemento stroncio, kiu ozonigas la aeron. Oni bone povas surloke prui la freŝecon de kaverna aero.

La *Kristala Kaverno* en Krivĉe ricevis la titolon: „perlo inter la kavernoj”. Kial? Plej ofte la ĉefaj vidindaĵoj en kavernoj, kiuj troviĝas en kalkŝtonaj regionoj, estas stalagmitoj kaj stalaktitoj. Pro senhalta aktivado de akvo, kiu lekas tra la kalkaj tavoloj kreskis tiuj mirindaĵoj. Sed turistoj jam al kutimiĝis al ili kaj ne plu miras. La manko de tiuj konstruaĵoj kaj la fenomo de kristaliĝo — kiu ekestas nur en gipsaj kavernoj kiaj tiuj en Krivĉe — kreas novan, neatenditan vidindaĵon. Sendube ili igas la *Kristalan Kaverton* turisman unikaĵon.

Araneo



Stalaktitoj kreskis en la kristala kaverno.




„La bubala kapo”

La angla

ENGLISH

Jen la lingvo, kiu kutime estas konsiderata kiel la ĉefrivalo — eĉ malamiko de Esperanto. Sed ne estas bona kialo por tio. Ja, la angla estas nuntempe la plej parolata lingvo internacie (431 milionoj da parolantoj¹), kaj ĝi ankoraŭ kreskas. Sed neniu lingvo restas superrega en la mondo ĉiame. Fine, en la pasinteco tio dependis de la potenco de la nacioj, por kiuj ĝi estis la denaska lingvo.

Oni kutimas forgesi, ke ankoraŭ en la antaŭa jarcento estis la franca kiu regis kiel plej prestiĝa lingvo por internaciaj kontaktoj — nur la francoj mem ne forgesas! Kiam imperioj disfalis, ankaŭ malpligraviĝas ties lingvoj, kvankam ne same rapide. Britio havis unu el la plej vastajn imperiojn en la historio, sed tiu antaŭ nelonge disfalis, kaj la patrujo mem ne plu estas la monda centro. Tamen, feliĉe por ĝia lingvo, tio okazis samtempe kun leviĝo de unu el ĝiaj filoj: Usono. Ĉi tiu transprenis la torĉon kaj ne nur daŭrigis la regadon, sed eĉ tre vastigis ĝin per filmoj, televido, komerco, turismo k.s. Aktuale aperas signoj, ke la usona lingvoregno siavice hezitas, dum aliaj nacioj, precipe en Azio kaj okcidenta Eŭropo, faras pli dinamikan ekonomian progreson. Kaj, kvankam Usono pro sia grandeco, loĝantaro kaj rimedaro, probable ankoraŭ longe restos mondskala potenco, ne malblas ke en la venanta jarcento alia



nacio kun alia lingvo transprenos mondestradon.

Estas debateble, ĉu la ecoj de lingvoj influas ilian eksteran disvastiĝon. Eblas ke, se estas evidentaj konkretaj avantaĝoj por uzi ĝin, homoj volonte pretas ĝin lerni, senkonsidere kiel malfacila tio povas esti por ili. Favorantoj de la angla tamen ofte reklamas ties lingvajn avantaĝojn super aliaj konkurencaj lingvoj.

En gramatiko, kvankam tiu tute ne tiel simplas kiel la ĉina, ekzemple for- estas iuj komplikaĵoj kiujn ja havas rivaloj. Ĝi estas eble la sola hind-eŭropa lingvo, krom la persa, kiu sukcesis senigi sin de la senmotiva gramatika genro, laŭ kiu la francoj (ekzemple) konsideras ordinaran tablon ingenra kaj skribotablon virgenra, arbitreco kiun oni devas parkeri por ĉiu substantivo.

Tio ne signifas, ke genro tute ne maltrankviligus angleparolantojn! Speciale dum nia epoko de feminismo oni provas eviti vortojn nun konsideratajn kontraŭ-virinaj, ekzemple oni nun pli ofte uzas neŭtran *chairperson* („prezidpersono”) por „prezidanto” anstataŭ la tradician *chairman* („prezid-

viro”). Multaj tiaj neologismoj aspektas al angleparolantoj ankoraŭ malertaj, kaj oni ankaŭ komencas senti mankon de genroneŭtra pronomo por „li/ŝi”.

Anglaj adjektivoj neniam ŝanĝiĝas, malkiel en aliaj eŭropaj lingvoj. Fakte, la distingo inter gramatikaj kategorioj kiaj substantivo, adjektivo, verbo k.s. estas iom erariga aplikate al la angla, ĉar vortoj facile kaj ofte estas uzataj diversmaniere: *bank* = banko, *bank book* = banka libro, *to bank* = enbankigi (monon), *by bank* = banke. La kunteksto kaj la vortpozicio devas montri la efektivan signifon — en kio la angla tre similas al la ĉina!

Ĝi estas demokrata lingvo. Malsame ol la plimulto de ĝiaj parencaj lingvoj, ĝi uzas nur unu vorton por „vi”, nome *you*, kaj ne plu estas distingo inter formoj ĝentila kaj intima. Kiel Esperanto, ĝi havas nur du kazojn por substantivoj, kiuj estas nominativo kaj genitivo (= posedokazo, ĉiam finiĝante per *-s*). Pronomoj aldonas unu kazon en ambaŭ lingvoj: akuzativo/dativoformon en la angla, genitivo („kies”) en Esperanto.

Verboj ankaŭ estas relative simplaj

rilate finaĵojn. La angla favoras kombinaĵojn de du aŭ pli da vortoj, pli ol finaĵojn. Sed kombinitaj verboj ankaŭ povas doni problemon por lernantoj. Ekzemple *to get on with* (laŭvorte „sur-iĝi kun”) povas efektive havi tiun signifon, sed multe pli ofte ĝi signifas „denove okupiĝi pri”; kaj estas granda diferenco inter *to see through something* („travidi ion”) kaj *to see something through* („fari ion ĝis la fino”).

Unu granda avantaĝo (por parolantoj) aŭ malavantaĝo (por lernantoj) estas ĝia vortprovizo, unu la plej ampleksaj en la mondo. Tre ofte oni povas trovi kvar alternativojn por diri ion. Estante baze ĝermanida lingvo, ĝi enprenis — post la normanda invado de Britio en 1066 — tiom da francaj kaj latinaj vortoj, ke nun ĝia vortstoko estas grandparte latinida.

Sed la procezo ne finiĝis tie; la angla daŭre bonvenigas vortojn el lingvoj de ĉiuj mondpartoj. Generale ili ankoraŭ obeas la originan ortografion — se latinalfabeto — kio helpas al eksterlandanoj rekoni ilin en skribo; sed ilia prononco estas alia afero. La angla ja posedas parolsonaron, kiu sufiĉe diferencas de aliaj eŭropaj lingvoj, aparte la vokaloj. Iuj parolantoj estas aparte malfacilaj por plimulto; ekzemple la *th* (kun jen voĉhava, jen senvoĉa valoro) en *this thing* („tiu ĉi objekto”), aŭ la *i* en *bird* kiu probable ne troviĝas en alia lingvo kaj prononciĝas tute malsame de la Esperanta ‚birdo’.

Kio kondukas al la plej grava problemo por lernantoj de tiu lingvo (ekster- kaj en-landaj!), ĝia fifama ortografio, kiu prononciĝas malsamege ol ĝi skribiĝas. Oni devas lerni la prononcon de preskaŭ ĉiu vorto aparte, almenaŭ ĝis progresinta etapo. Do, se tio daŭros, la angla povus troviĝi en situacio kiel la ĉina, kie ĉiu skriba vorto havas propran aspekton, sed ne provas montri sian prononcon.

Geoffrey Sampson² [Ĝefri Sempsen] sugestas, ke ortografio kiu estas plej bona kompromiso inter la kontraŭaj bezonoj de la lernanto kaj de la leganto, povas esti io simila al la angla. Tamen li probable ne trovas multajn eĉ denaskajn parolantojn, kiuj konsentus kun li. La angla ortografio estas fakte katastrofo!

Alia problemo, foje troigita, estas la diseco inter brita kaj usona (plus aliaj) specoj de la lingvo. Ekzistas ja diferencoj en la vortaro, la prononco kaj la ortografio, sed ili estas sufiĉe malgrandaj por ne malhelpi komunikadon, kvankam internaciaj novaĵ-agentejoj devas foje ‚traduki’ la anglan al la... angla.

Ĝi estas oficiala lingvo de pli multaj landoj ol iu ajn alia lingvo, kaj krome havas rolon en landoj kiel Hindio, kie ĝi servas kiel interlingvo. Ĝi certe estas la plej disvastigita lingvo por monda turismo kaj monda komerco. La angleparolanta turisto — ofte fifama pro sia manko je preteco kaj lerteco lerni fremdan lingvon — tamen baldaŭ povas konstati ke lia maksimumo „Ĉiuj komprenas/parolas la anglan” malveras! Kaj kvankam ĝia etendiĝado daŭras en la pli multaj landoj, tio ne estas la situacio universale.

Tion mi mem povis observi en du landoj, kiujn mi lastatempe vizitis. En Tajlando tre malmultaj scipovas ĝin, sed la junuloj avide lernas. En Sri-Lanko kontraŭe, la angla estis kolonia kaj oficiala lingvo, instru-perilo kaj interlingvo por la plimultaj sinhaloj kaj malplimultaj tamiloj. Sed la registaro anstataŭigis ĝin per la sinhala, kio estis grava kaŭzo de intergenta milito, ĉar la tamiloj pro tio eksentis sin elbaritaj de povo. Nun en Sri-Lanko estas precipe maljunaj personoj, kiuj regas la anglan.

Ankaŭ estas demando, kiel bone regas la anglan homoj en ne-anglaj

landoj? Ĉu via taksiisto scias pli ol la evidentaj kelkaj frazoj? En multaj landoj (ekzemple en orienta Azio kaj orienta Eŭropo) oni vidas t-ĉemizojn kun surskriboj uzantaj anglajn vortojn, sed kiuj fakte nenion signifas, kio demandigas, ĉu la portanto scias tion! La desegninto evidente ne sciis. La angla certe estas dinamika lingvo. Inter la gravaj kialoj ankaŭ estas la manko de iu angla akademio — tia lingvokomitato, kian havas ekzemple la franca kaj hispana lingvokomunumoj, kaj kiuj kutime bremsas la evoluon de tiuj lingvoj. Tiuj, kiuj direktas la ŝanĝon de la angla lingvo estas precipe ĝiaj ordinaj parolantoj.

Ĉu la angla iĝos LA internacia lingvo por la estonteco? Probable ne. Ĝi ĉiam dependos de siaj denaskaj parolantoj, kaj de la politika kaj ekonomia potenco de ties landoj; kaj ĝia pludaŭro estas almenaŭ malcerta. Estas dubinde, ĉu neneŭtrala lingvo povas resti longtempe Lingvo Numero Unu.

Bradley KENDAL

1. Ciferoj el la lingvolisto de Sidney Culbert en MONATO 4/91, p.18).

2. Sampson, Geoffrey: *Writing Systems* (London, Hutchinson, 1985).



Dum longa tempo la ukrainia lingvo ludis la rolon de l' Cindrulino, de duonfilino en sia propra hejmo. La nivelo de rusigo estis terure alta kaj oni konsideris la ukrainian kiel kamparanan lingvon. Vere, ĝi konserviĝis plejparte en okcidentaj regionoj de la lando, kie la politiko de rusigado komenciĝis nur post la dua mondmilito. Post la „paca” revolucio la lingva politiko eniris la malan direkton. En Kievo, laŭ ordono de la urba administracio oni ŝanĝis la titolon de 123 mezlernejoj kaj nun en la ĉefurbo el 318 mezlernejoj 271 estas ukrainiaj. La administracio decidis tion ĉar gepatroj de 24 miloj da infanoj volis sendi siajn idojn al unua klaso de ukrainia lernejo kaj nur 3,5 mil al ruslingva. Ankaŭ ĉi-jare denove post 60 jaroj ekfunkciis mezlernejoj por germanoj kaj por judoj.

Araneo

Ne tiom distra distraĵo

Distraj legendoj de Hirano estas rakontaro el la japana lingvo, tradukita de la veterano esperantista, Okumura Rinzo. En la komenco de la legado, sento de miskompreno trafas okcidentan leganton kiel mi.

La enkondukaj „Vortoj de Tradukinto” estas eble tuj kaj tute facile kompreneblaj de japano, sed eŭropano devas iomete pripensi ilin. Pli bone estus, se la tradukinto komence klarigus kelkajn detalojn, kiuj fine klariĝas en la „Okaze de la eldono”, de Murata Takashi, kaj en la „Postskribo” de Niŝigōri Hiroŝi: tiam, en tiuj lastaj paĝoj, oni bone ekscias ke tiaj legendoj kutime estis rakontataj de maljunuloj, kiuj sin distris „sur benketo antaŭ sia hejmo” en la urbo Hirano.

Kiel diris Niŝigōri (li aŭskultis la rakontadon!), estis problemo „restigi en la teksto la parolmanieron de la rakontantoj; tial neeviteble enmetiĝis dialogoj kaj vortoj nekutimaj al junaj aŭskultantoj”. Sekve estas petate, ke „la spertaj gepatroj klarige rakontu al siaj gefiloj”. Nu, se ili estas japanoj, mi pensas ke la problemo facile solviĝas, sed por eŭropanoj restos miskomprenoj.

Ĉiu legendo estas ilustrita per desegnaĵo iom infaneca, kio eĉ povas kongrui kun la naiveco de la rakontoj. Malgraŭ ĉio, la eldonaĵo iel gravas pro tio, ke tiel oni konservas en la internacia lingvo epizodojn kun historia fono, kiuj alie certe perdiĝus pro la lastatempa manko de aŭskultantoj.

Glauco RODRIGUES CORREA

Distraj legendoj de Hirano. Tradukis el la japana Okumura Rinzo. Ilus. 50p. Prezo ĉe UEA: 9 NLG + AVI + afranko. Ne akirebla ĉe FEL.

Vivoplenaj lingvaĵoj

La verkaro de Andrzej Pettyn en la kampo de la instruado de Esperanto estas jam bone konata en Esperantujo kaj jen nova ero en lia produktado. Tiu ĉi verko „celas paroligi ... per mallongaj epizodoj-dialogoj, en kiuj troviĝas kliŝaj frazomodeloj kun substitueblaj (ŝanĝeblaj) elementoj” (p.3). Ĝi estas uzebla kombine kun ia ajn lernolibro aŭ sen tia. Ĝi prezentas ĉirkaŭ 230 dialogojn de 10 linioj. La unuaj 54 baziĝas sur simplaj k-demandoj (kiu?, kio?, ktp.), la sekvaj sur k-demandoj kun prepozicioj (kun kiu?, per kio?, ktp.). La dialogoj

plej ofte konsistas el demando kaj respondo, por kiuj estas proponitaj pluraj variantoj, laŭ la sistemo de la strukturisma metodo (angle: *pattern drills*) Ili prezentas plej varian kaj plej modernan lingvan materialon, ne malofte kun iom da humuro aŭ da provokemo. Krome, la enkonduko enhavas valorajn sugestojn por la uzado de la libro.

La metodo postulas de la instruisto, ke li klarigu la lingvan materialon antaŭ la komenco de la ekzerco mem. Tiu materialo ne estas ĉiam facila, nek leksike nek gramatike. Dialogo n-ro 10, ekz., kies temo estas ‚kiu?’, uzas ok adverbojn de tempo kaj la tempan akuzativon.

De la lernanto la metodo postulas, ke li volonte akceptu la kelkfoje tre heterogenan materialon. Aliflake, mi povas imagi, ke ĝuste tiu fantazirika trajto plaĉos al iuj. Ĝenerale, la metodo uzas vortojn por sugesti situaciojn, nur en kelkaj kazoj ekzistas pli natura rilato, kie reala situacio postulas vortojn kaj strukturojn (ekz. en dialogoj 83 kaj 84: „En kia kostumo/mantelo/robo/patalono vi plej bone sentas vin?” kaj „En kia stato troviĝas via pantalono/robo/E-vortaro/har-sekigilo?”)


Finfine, kiel ofte okazas ĉe metodo, kiu sekvas unu solan principon, grandaj sektoroj de la lingvo restas ne aŭ apenaŭ tuŝitaj, ekz. la participoj, la rekleksivo, la problemoj -igi kaj -iĝi, la komparoj, la antaŭ- kaj post-tempeco, la uzo de adverba formo en la predikativo, ktp. Pro tio, mi opinias, ke la titolo promesas pli ol la enhavo liveras. Sed, ene de siaj limoj, la verko certe alportas kaj al la lernanto kaj al la gvidanto riĉan fonton da vivoplenaj lingvaĵoj, kiuj tre agrable kontrastas kun la leciontekstoj de tradiciaj lernolibroj.

Emile VAN DAMME

Andrzej Pettyn, *Esperanto en epizodoj*. Eld. Oy Mendoservo Ak, Hyvinkää, 1992. 92 p. ISBN: 951-96976-9-2. Prezo ĉe FEL: 360 BEF + afranko; ĉe UEA: 19,50 NLG + AVI + afranko.

Teda kun interesa aldonaĵo

En la sufiĉe bone kompostita kaj presita broŝuro *Florville kaj Courval* troviĝas enkonduko kun notetoj pri la biografio kaj verkaro de la aŭtoro, markizo de Sade. Se la legonto nenion scias pri li, la notetoj iom klar-



igas kaj eble vekos interesiĝon legi aliajn verkojn de tiu franca verkisto tutmonde fama, almenaŭ pro tio, ke de lia nomo devenas la vorto sadismo. En la lastaj paĝoj de la libreto estas aldonita letero lia al la ‚figazetisto’ Villeterque, kies recenzo pri „La krimoj de l’ amo” insultis lin. Tiu bonstila verkita letero malkaŝas la mondrigardon de la aŭtoro, kaj povas esti konsiderata kvazaŭ klera eseo pri la eterna temo literaturo *bono kontraŭ malbono*. Gratulon al la eldoninto pri lia feliĉa iniciato enmeti en la eldonaĵon tiun tre interesan kaj gravan dokumenton. Tiu peco valorigas la tuton.

Se pro la (mis)famo de la aŭtoro la legonto esperas legi pornografiaĵon aŭ erotikan rakonton, mi antaŭsciigas, ke li/ŝi seniluziiĝos. De Sade siamaniere estas speco de moralisto, kiu, se ne instruas moralon kaj virton, implicate reliefigas ties gravecon kaj neceson ĉe la homa vivo malgraŭ tio ke li literature priskribas kion li ofte konstatas el la reala mondo, nome la venkon de la malbono kaj malvirto. La problemo pri legado de verko de de Sade estas, ke lia stilo (kiun la tradukinto sukcesis speguli en Esperanto) tre melodrama, tre antaŭromantisme kaj nigraromane kliŝa certe tedas la nuntempan leganton. La intrigo estas longa kaj plena je troaj malfeliĉoj kaj suferoj trafantaj la protagoniston. Sed oni ne povas nei, ke la verkaro de de Sade rangas kaj en la franca kaj en la universala literaturoj. Tial mi opinias legenda la novelon *Florville kaj Courval aŭ fataleco*, kiu ne malsamas teme kaj stile al aliaj verkoj de la markizo. Jen estas do oportuno por iu ankoraŭ ne konatiĝinta kun tiu grava verkisto, ekkoni lin per tiu bone tradukita novelo.

Glauco Rodrigues CORRÉA

Markizo de Sade: *Florville kaj Courval aŭ fataleco*. Tradukis el la franca Armela Le Quint kaj Jak Le Puil. Eld.: Fonto, Chapeco, 1992. 80p. Prezo ĉe FEL: 180 BEF + afranko, ĉe UEA: 10,20 NLG + afranko.

de Higinio Garcia

Sub la fumoj de l' uzino

1.

Ĉi-foje, Nikko ne atingis la kapon de la rato per sia balailo. Li frapis la ventron, kaj la sango kaj la intestoj ŝprucis ĉiudirekten.

Kiam, malgraŭ la naŭzoj, li finis purigi, li eksplodis kontraŭ Leo:

— Sed kial, por farĉi kian ingon ni havas tiun kojonulon ĉi-tie? Dimanĉe mi jetos lin sin fingrumi en la rubejon! Tremante, Mudja ĉirkaŭprenis Leon al si. Kion farus tiu malgranda, pluŝa Leo en la rubejo, kun la ratoj, la blatoj, la sovaĝaj senlaboruloj kiuj certe manĝos lin? „Se vi estus kuraĝa kiel Nikko...”

Leo, sekura en la brakoj de Mudja, cinike rigardis ŝin, poste Nikkon, kaj lekis al si la muzelon.

Vere, la kato nomiĝis Leonkoro, sed oni mallongigis lian nomon je Leo. Li estis verdokula (kiel Mudja) kaj terure malkuraĝa. Fakte, li neniam faris sian katan devon.

Nikko lin aĉetis kiam la Ekonomia Partio regis la Urbon. Tiutempe, por aktivigi la industriojn de motorcikloj, laserglavo kaj kapredukto, oni forigis la kontrolojn pri ĉasado de senlaboruloj, kiuj estas la naturaj predantoj de ratoj. Konsekvence, kiel profetite de l' Ekologia Partio, la ratoj eniris en l' Urbon; kaj iom poste, en la domojn.

Kiam Leo vidis raton, li eĉ ne ĝibigis la dorson kaj eĉ ne hirtigis la harojn. Kontraŭe, kompatinde miaŭanta, li saltis en la sinon de Mudja kaj kaŝis al si la kapon en ties akselo.

Nikko devis preni balailon kaj mortigi la invadanton.

De tiam, oni sciis ke estas rato ĉedome, kiam Leonkoro rifuĝis en la brakoj de Mudja.

Feliĉe, Nikko estis kuraĝa. Li persekutis la raton per balailo, ĝis fine li ĝin senmovigis en angulo kaj mortigis per bato sur la kapon.

Mudja admiris Nikkon, sed ŝi amis Leon. „Se Leo havus la kuraĝon de Nikko...”

2.

Krom tiu sekurenda kato, ŝi havis sekurigan, ĉifonan pupon kies nomo

estis Birdotimo, mallonge Tim'. Ĝia vizaĝo estis ronda, kun malgrandaj okuloj kiuj ŝajnis la du punktoj de tremao surmetita sur malgranda fermita buŝo en formo de m majuskla. Ĝi aspektis tiel stulta kaj sendefenda, ke Mudja inkliniĝis al mistrakto kaj turmentado. Tamen, kiam la pupo rigardis ŝin per siaj tremaaj, stultaj, tristaj okuloj, ŝi ĝin dorlotis.

Birdotimon faris la patrino de Mudja el malnovaj vestaĵoj de Nikko. Ĉar ŝi eltondis la trunkon el pantalono, ĝi havis zipon ĉe la ventro.

Por plenumi sian infanan devon, Mudja ludis kun la pupo. Ŝi ludis lernejon, hejmon, promenadon.

Hospitalon, ankaŭ. Ŝi tiris la zipon kaj operaciis sinjoron Birdotimon. Foje, la operacio sukcesis. Foje, la paciento mortis, Mudja enterigis en tirkesto kaj forgesis ĝin. Tiam, ŝi feruis el Tim', ĉar fakte, ŝi ŝatis nek ludi kun pupoj, nek pupojn, nek Timon.

Ĉu estis ke Birdotimo tro similis al Nikko Ĉalmavet, la fraŭla patro de Mudja? Ankaŭ li havis rondan, naivan vizaĝon, kun okuloj tro proksimaj inter si, kiuj aspektis strabaj. Sed kontraŭe, la rigardo, stulta ĉe la mola pupo ĉifona, estis ĉarma ĉe la grandkorpa, muskola, fortika viro. Kaj li plaĉis al virinoj.

Iam, unu el liaj amistinoj, pikkalkanumulino kiu plezuris ĉe pupoj, decidis

havi bebon de li. Dum sia gravedo ŝi ludis pupojn: ŝi pretigis bebovestojn, lulilon, ludilojn, beboĉambron... Ŝi eĉ faris sekurigpupon por la venonta bebo, el vestaĵoj de Nikko: Birdotimon.

Sed la bebo kiu venis ne estis pupo: estis Mudja. Kaj ĝi ploris, kaj dumtage kaj dumnokte. Kaj ĝi senĉese malpurigis vindotukojn kaj hop-hop-antojn. Kaj ŝi rifuzadis dormi.

La sendefenda patrino provis ĉiom por silentigi la bebon: eĉ partigi siajn dozojn de mariĥuano kaj haŝiŝo inter siaj cigaredoj kaj ĝia suĉbotelo. Nenio efikis. Fine, ĉar laŭ la konsultata psikoterapeŭto, la bebo minacis endanĝerigi kaj ŝian pikkalkanuman karieron kaj ŝian virinecan liberon kaj ŝian mensan sanon, ŝi donacis ĝin al Nikko, kun Birdotimo kiel bonifiko¹ kaj malaperis.

Tiu historio, kiun Nikko rakontis por klarigi al Mudja kial ŝi ne havas patrinon, faris ke la knabino sin demandis ĉu povas esti ke ŝi havas parapsikajn povojn. Ĉar oni diras en Uzinurbo ke bebo, kiu elsuĉas mariĥuanon aŭ haŝiŝon (kaj plie, mariĥuanon kaj haŝiŝon) aŭ psikozas aŭ parapsikas. Nu, ŝi ne psikozas, do...

...Ĉu okazas tio kion oni forte deziras? Precipe, se oni havas parapsikajn povojn...

Ĉu estas eble ke Leonkoro iĝos tiel kuraĝa kiel Nikko?



Ŝi sidis sur la kalkanoj, koncentriĝis kaj forte deziris por Leonkoro la kuraĝon de Nikko.

3.

L' Uzino ĉiam fumis. La fumoj estis densaj kaj verdaj, starigis la horoskopistoj, por protekti la Urbanojn kontraŭ senlaboreco kaj ilin ŝirmi de la danĝeraj ultraviolaj sunradioj. Sed la nuancoj de verdo kaj la gradoj de denseco senĉese ŝanĝiĝis laŭ la humoroj de l' Uzino, kaŭzante tiun kalejdoskopan lumecon de l' Urbo kiun Mudja tiom amis. Ŝi neniam eniris en l' Uzinon. Sed Nikko diris ke Ĝi estis tiel supermezure granda, ke eĉ ne la inĝenieroj, kaj eĉ ne la Ekonomiistoj konis la tuton. Ĝi havis milionojn da okuloj de ĉiuj koloroj: blankaj, verdaj, flavaj, bluj... miloj da brakoj kaj buŝoj, duilionoj da nervoj...

La parto kiun li parte konis, iel dirite ero de la intestoj, estis giganta labirinto de kaŭĉukmetalaj tubaj koridoroj tra kiuj kuris la reciklotaj restaĵoj.

Tie, Nikko estis surkankra purigisto.

Rajdanta biomeĥanikan kankron, li devis liberigi l' Uzinajn intestojn de la plastaj filamentaj mukaĵoj kiuj kreskis sur la parietoj.

Estis danĝera laboro. La mukaĵoj sin defendis per fulmrapidaj vipbatoj. Lerte stirata, la kankro per siaj pinĉiloj kaptis, fortiris kaj manĝis ilin. Sed, se la neŭromeĥanismo² de la kankro aŭ la atento de la homo iomete mankus, la vipoj tranĉus hommembron kiel la-serglavo.

Jes ja. Tio estis kiam Nikko alportis al ŝi korbeton kun kudrilaro. Enestis koloraj ŝtofpecoj, fadenoj, kudriloj, pingloj, kaj tondilo kiu tondis ŝtofon kaj paperon, sed ne la fingrojn.

Ŝi decidis - eĉ nun ŝi ne scias kial - fari veston por Tim'. Ŝi mezuris, tajlis, tondis, kudris... kaj fine fasonis la veston. Tamen, Tim' ne volis ĝin surmeti.

Ŝi jam certe konis la ribeleman karakteron de Tim'. Sed ĉi-foje, li eĉ ne volis esti vestata. Kiam brako eniris manikon, gambo eniris la kolon de la vesto. Kiam la kapo trairis la kolon, la gambo sin enŝovis en manikon.

Mudja ekkoleris, kaj la fumo de l' Uzino iom malheliĝis.

Ŝi provis sin kvietigi, kaj pli milde, malpli rapide vesti Timon.

Senrezulte.

Nun, ŝi vere koleriĝis. Dum l' Uzino kraĉis preskaŭ nigrajn densajn fumojn, ŝi, furiozospasme, forŝiris al Tim' la gambon kiun li ne volis traŝovi en la krurumon.

Ŝi rigardis Timon, kiu komplence rigardis ŝin: ili ludos hospitalon.

L' Uzinaj fumoj, malsane nigraj, glue densaj, suĉadis la fenestrojn.



4.

Oni abrupte malfermis la pordon de la domo. Eniris blovo de nigra fumo, kaj en ĝi du homoj portantaj blankardon, sur kiu kuŝis Nikko.

Mankis al li la dekstra gambo.

La homoj provis ekspliki al la knabino ke la neŭromeĥanismo de la kankro ne sufiĉe rapide reagis, ke...

Mudja ne aŭskultis ilin: ŝi jam sciis ke l' Uzino detranĉis la gambon.

Ŝi sidiĝis sur la kalkanoj, kaj medite rigardis sian patron.

Larmoj fluis el ŝiaj okuloj.

Ĉu pro kulposento? Ĉu pro fumo?

Ĉu pro fumo? Mistere, la fumoj kvietigis, heliĝis, kaj ŝvebis en preskaŭ blankaj kumuluso.

Ŝi spiris ilin.

Grade, la spiro ritmiĝis, ŝiaj grandaj verdaj okuloj sekiĝis, senrigardiĝis, kaj ŝi sentis ke ŝia konscio solviĝis en la Spirado de l' Uzino.

Tiam, sekure rifuĝinta en ia nodo de energio koncentrita en la umbiliko, ŝia profunda Mi serene intuciis ke ĉio estas en ĉio, ke ĉio por io utilas, ke ĉio estas bona.

La gambon de Nikko oni miksis kun aliaj hospitalo-kaj buĉejo-forjetaĵoj, el kiuj oni faros kaĉon por katoj. Kiam

oni miksis tiun etan kvanton de kuraĝula karno kun granda kvanto de alispeca, eĉ en proporcio de unu al miliono, la fina miksaĵo gardos en sia memoro, elektronike, la kuraĝon de kuraĝulo. La neŭronoj de malkuraĝa kato kiu manĝos tiun kaĉon estos do kuraĝigitaj homeopatie.

La gambon oni reciklos, Leo iĝos brava, Nikko havos belan metalan gambon kaj ne plu estos trudata mortigi ratojn per balailo.

Tra la helaj kumuluso de kvazaŭ incensa fumo, la malhelaj verdaj okuloj de Mudja kaj Leo rigardis Nikkon, kiu dormis en limbo de anestezo.

Mudja anĝele ridetis. Leo lekis al si la muzelon.

1. Bonifiko: ekstra profito atribuata ekster la kondiĉoj de kontrakto.

2. Neŭro-: el la greka, prefikso signifanta „nervo“.

Kontribuojn por la rubriko „nove-
lo“ vi sendu al:

William Auld
Harviestoun Road 20
Dollar, Clack.
Britio FK4 7HG

de Edward Symoens

Evoluo kaj subevoluo

Unu el la plej traktitaj temoj en la nuntempo estas tiu de la t.n. tria mondo, de la evolulandoj, de la malriĉaj landoj. Ni legas pri evoluhelpo, pri evoluhelpantoj, pri evoluprojektoj, sed malofte ni legas ion pri la vera signifo de la nocioj 'evoluo' kaj 'subevoluo'.

Ni legas ke multaj evoluprojektoj fiaskas, ni legas ke la malriĉaj landoj daŭre pli malriĉiĝas kaj la riĉaj pliriĉiĝas, kaj ofte oni imputas tion al la teknikoj de ekspluatado de la riĉuloj, al novaj ekonomiaj faktoroj, al la manko de kapitalo kaj investoj, la terure altaj ŝuldoj de la tria mondo, ktp. Sed tre malofte ni serĉas de tiu situacio la verajn kaj profundajn kaŭzojn, kiuj situas grandparte en la homoj, en la popoloj mem, en ilia mensostato, en ilia pensmaniero, ilia religia kaj filozofia psika substrato.

Ankaŭ temas pri relativaj, ne absolutaj konceptoj, pri komparoj. Iu estas subevoluinta kompare al iu, kiun oni - prave aŭ malprave - konsideras evoluinta, kaj ne ĉiam estas facile difini la parametron. En t.n. evoluinta socio ankaŭ ekzistas subevoluintaj homoj aŭ eĉ homgrupoj, kaj en subevoluinta socio ankaŭ ekzistas evoluintaj homoj...

La nuna komparmodelo

En la hodiaŭa internacia socio la okcident-eŭropa teknologia civilizacio estas konsiderata kiel komparmodelo por multaj aliaj homoj tra la mondo. Tamen, ne eblas diri: kiu ne vivas laŭ la okcident-eŭropa modelo estas subevoluinta, ĉar ekzistas gravaj nuancoj inter ekz. la evolunivelo de la afrikanoj, la sud-amerikanoj, la ĉinoj, la hindoj, kompare al okcident-eŭropanoj. Tro ofte, oni komparas nur eksteraĵojn, tuj videblajn malsimilaĵojn en la vivmaniero, la loĝ- kaj transport-eblecojn, la ĉiutagan komforton, la kuracarton, la manĝokutimojn, la kapablon legi kaj skribi, la ekonomian potencon, ktp.

Oni forgesas la homojn

Ĉiam temas nur pri materiaj, mezurblaj diferencoj kaj la evoluprogramoj, la evoluprojektoj, grand- kaj malgrand-skalaj, nur celas malpligrandigi tiujn diferencojn. Laŭ ĉiuj oficialaj raportoj, tre ofte la projektoj malsukcesas, ĉar oni vole nevole forgesas la homojn, por kiuj la projektoj estas destinitaj kaj kiuj iamaniere devas realigi ilin.

Kaj tamen, laŭ mia sperto kaj modesta opinio, tie kuŝas la kaŭzo de multaj fiaskoj, precipe de la grandskalaj projektoj.

Oni ne sufiĉe konscias, ke fakte ne ekzistas evolulandoj sed ja evoluopopoloj. Lando estas tio, kion popolo faras de ĝi, kaj popolo nur povas fari ion, se unuflanke en tiu popolo ekzistas kon-


scio kaj deziro pri ŝanĝo, pri plibonigo, pri kresko, pri evoluo, kaj aliflanke se krom tiuj konscio kaj deziro, ekzistas la necesa teknika sciaro kaj la necesaj rimedoj por realigi kaj precipe konservi la deziratajn ŝanĝojn.

Sen tiuj primaraj kaj profundaj konscio kaj deziro ĉe la popolo aŭ almenaŭ ĉe larĝa tavolo de la popolo, ĉiu ekstera helpo aŭ kunlaboro renkontas indiferentecon, nekomprenon, eĉ kontraŭstaron. Kaj se iu projekto kelkatempe ŝajnas sukcesi, post la foriro de la eksteraj helpantoj, ĝi ofte stagnas kaj post nelonge ĝiaj favoraj efikoj malaperas.

Estas historia, observebla fakto, ke tiuj konscio kaj deziro pri ŝanĝo kaj plibonigo de la ĉiutaga vivo ekzistas en tre malegala grado ĉe la popoloj, eĉ ĉe individuoj de la sama familio.

Konstati kaj esprimi tion neniel rilatas al kiu ajn sento de diskriminacio. Temas parte pri biologia, parte pri soci-politika fenomeno, kies meĥanismo kaj konsistigajn elementojn ni povas klopodi malkovri kaj analizi la plej profundajn kaŭzojn.

Ĉion redukti al nur hazarda ekonomia aŭ teknologia malantaŭeniĝo kompare kun aliaj popolgrupoj, ne tuŝas la plej profundan kernon de la problemo. Aŭ imputi ĉiujn malfeliĉaĵojn de la tria mondo al la avidemo, al la imperialismo, nur al la kolonia aŭ postkolonia superregado de la riĉaj landoj, ne rezistas al serena, objektiva analizo kaj forgesigas ke ankaŭ la nunaj riĉaj landoj ne ĉiam estis tiaj, kaj en sia historio ankaŭ ili ofte estis koloniigitaj de



aliaj landoj, kelkfoje antaŭ multaj jarcentoj.

Ne, la kerno de la problemo kuŝas pli profunde, en la homo mem, en lia mensso, lia cerbo, en lia koro.

Evoluo estas antaŭ ĉio individua, interna, ne ekstera fenomeno. Ĝi komenciĝas en la individua homo, en ties konscio. Ĝi estas kiel nova naskiĝo. Ĝi apartenas al mensostato, al evolu-mensostato, al evolu-preteco, al evoludezirezo, kaj se tiu ekzistas kiel baza impulso, oni per si mem serĉas la adekvatajn rimedojn por realigi tion, kio vivas en la konscio.

La teknologio estas akcesora, ne primara donitaĵo; sekvo, ne kaŭzo. Unue devas ekzisti primara impulso, kiu iĝas kaŭzo de serĉado kaj trovado de rimedoj.

El tiu konscio kaj la akompana deziro modifi iun situacion, kiun oni spertas kiel doloran aŭ nedeziritan, iom post iom evoluas adapto de la intelekto kaj naskiĝo de favora mensostato, en kiu kelkaj elementoj povas akceli la deziritajn ŝanĝojn, kiuj estas malhaveblaj por ĉiu evoluoprocezo.

Elementoj de evoluiga mensostato

Mi volas denombri kelkajn, sed ekzistas ankoraŭ pliaj:

- *Preciza konscio de la tempo*, en kiu estinteco, estanteco kaj estonteco klare distingiĝas kaj kiu estas je la bazo de ĉiuj formoj de evoluo kaj kreskado (en si mem tempofenomenoj), de ĉiuj formoj de organizado kaj planado.
- *Inklino al objektiveco*, per kiu oni

povas distanciĝi de tro granda persona ligiteco al reganta mondbildo kaj de nur propra plaĉo aŭ profito.

- *Racia kaj logika pensado*, bazo de ĉiu senchava plano, de ĉiu celkonscia aktiveco, „forĵetante al la kutimoj, moroj, kredoj k.s. ĉion, kio ne povas esti pruvita aŭ aprobita de la racio“ (PIV).

- *Dinamika mensostato*, kiu kondiĉigas aktivan vivosintenon, necesa por modifi tion, kio estas modifenda kaj modifebla.

- *Vivosinteno kiu fidus al kaj apogas sin sur la individuo*, kaj ne ekskluzive fidus al la komunumo.

Ĉu estas hazardo, ke ni konstatas plimalplian foreston de tiuj ecoj kaj sintenoj ĉe la t.n. subevoluintaj homgrupoj? Ĉu ne ekzistas ligo inter la ĉeesto aŭ la foresto de tiuj ecoj kaj sintenoj unuflanke, kaj la kontrasto evoluo/subevoluo aliflanke, almenaŭ laŭ okcident-eŭropa modelo?

Ni ja scias, ke ĉe multaj personoj mankas klara tempokonscio, kaj ke tio speguliĝas en kelkaj lingvoj, kie foje mankas eĉ klaraj verboformoj por indiki la pasintecan kaj la estontecan. Oni vivas en la nuna momento, hodiaŭ, kaj ĉio alia estas iu nebula ne-nun, nehodiaŭ.

Vera sento pri objektiveco plej ofte mankas ĉe triamondanoj. Ĉio okazas en funkcio de io aŭ iu alia, estas interplektita kun personoj, sentoj aŭ aliaj okazaĵoj. Prezidanto Mobutu en Zairio iam diris en fama parolado: „Ni ne pensas kiel vi (eŭropanoj), ni ne estas karteziianoj!“

Fatalismo, religia aŭ magia, inklinigas al rezignacio kaj blinda akcepto de la propra sorto, sen reago kia ajn.

Rezonado apogas sin sur emocioj pli ol sur logikaj kaj raciaj argumentoj. La individuo fakte ne gravas; nur la komunumo superas kaj nur ties pluekzisto valoras.

La grundo kaj la elementoj de tio, kion ni kutime nomas evoluo/subevoluo, kompreneble ne povas resumiĝi en kelkaj linioj, sed ne estas spaco por detaligi kaj ilustrati ĉion nun. Mi nur klopodas iomete orientigi la pensadon de la leganto en alian direkton ol la kutima; igi lin aŭ ŝin reagi kritike, legante pri tiu problemaro.

La konstato de tiu dualismo nepre ne, kaj mi insistas, enhavas valorjuĝon. Ni povas nur konkludi el ĝi, ke troviĝas je la bazo de ĉiu evoluumodelo - eŭropa aŭ alia - tuto de difinitaj mensaj premisoj. Mi do tute ne asertas, ke la eŭropa modelo estas pli bona aŭ malbona ol la afrika aŭ la azia modelo. Nur ke la elekton de iu difinita modelo neeviteble akompanas akcepto de la esence propraj premisoj de tiu modelo. Elektro ĉiam signifas ke oni akceptas ion kaj forlasas, eĉ forpelas ion

alian. Komplete libera elekto preskaŭ ne eblas. La interplekto de malsamaj evoluumodeloj estas tre komplika sociopolitika fenomeno, kaj tio dum multaj generacioj certe daŭros. Sed elekto necesas, konscia aŭ nekonscia, tio estas neevitebla. Alstremi nur la avantaĝojn de pluraj modeloj ne eblas! Kiel diras la germanoj: *Wahl macht Qual* - (Elekto suferigas).

Ne pensu ke ĉio ĉi estas nur teorio. La generacio de junaj afrikaj intelektuloj plene konscias pri tiu problemaro, kaj en multaj verkoj (ofte universitataj disertacioj) troviĝas ekzemploj de nova pensmaniero. Jen du ekzemploj inter multaj aliaj :

En franclingva disertacio pri „La malgranda kaj meza komerco en Eburbordo“ mi legas: „Difini la malgrandan komercon kadre de la *ekonomia logiko* el kies vidpunkto ni rezonas, estas kontraŭa, almenaŭ nun, al la *komuna logiko de postvivado* de la tradicia afrika ekonomio, kiu gvidas la agantojn de la malgranda komerco...“

Alia citaĵo en traduko: „La dispartigo de la financaj rimedoj okazos ‚ankoraŭ‘ laŭ malegalaj kriterioj pro la fakto, ke la elektokriterioj estos *tre subjektivaj* en la konscio de la aktivecoj de la banko.“

En la unua citaĵo temas do pri la kontrasto individua logiko / komunuma logiko; en la dua pri la kontrasto objektiveco / subjektiveco. Ni povas prezenti antologion pri eldiroj de junaj intelektuloj el la tria mondo, pli ol ĉe pensuloj el Eŭropo, kiuj tro ofte ne povas liberiĝi el ekonomio, industrio, produktado, kapitalo kaj kiuj forgesas ke estas bezonataj pluraj generacioj por ŝanĝi pensmanieron kaj vivsistemon.

Pro tio, ne estas facile trovi tuj videblajn rezultojn, certe ne rapidan solvon al ĉiuj problemoj de la tria mondo.

Finaj pripensoj

La fundamentan demandon ni povas starigi jene: se la antaŭa rezonado kaj pripensado estas ĝusta kaj ke ekzistas logika rilato inter difinita evoluumodelo kaj difinitaj mensaj premisoj por realigi ĝin, kiel ni povas grefti tiujn bazajn premisojn sur aliaj premisoj, kiuj kondiĉigas alian evoluumodelon? Aŭ pli konkrete dirite: se afrika komunumo elektas eŭropan evoluumodelon, kia grade la mensaj postuloj por efektiviĝi ĉi tiun modelon estas akordigeblaj kun la afrika mensostato kaj la afrikaj pens-kaj viv-kutimoj?

Ĉu tia akordo eblas? Ĉu entute evolua modifo de mensostato eblas? Laŭ mia opinio jes, sed tio postulas longan tempon; danke la pacienca laboron de pluraj generacioj, la alstremitaj ŝanĝoj povas efektiviĝi. Evoluprojektoj kvin-

aŭ dek-jaraj ne sufiĉas por tiu celo. Tamen, tiuj nepre necesas por trarompigi la izolitecon de la homoj de la tria mondo, por kutimigi ilin al novaj teknikoj kaj instigi ilin al pensado, komparado. Sed, en ĉiuj evoluprojektoj enestis tiu specifa homa dimensio de konsciigo kaj motivigo, verŝajne la plej malfacila aspekto de la projekto, sed la plej vivnecesa por ke ĝi daŭru, estu akceptita kaj asimilita de la homoj. Sennombraj en si mem valoraj projektoj pereas pro neglekto de tiu realeco.

La fakto ke en ĉiuj landoj de la tria mondo ekzistas junaj intelektuloj, kiuj plene konscias pri la skizita problemaro, pruvas ke tiudirekta evoluo eblas, ke neniu popolo estas apriorie kondamnita al stagnado aŭ al eternaj malriĉo kaj mizero - mi scias, ĉar mi diskutis kun multaj el ili. Tiuj konsciaj homoj bedaŭrinde estas ankoraŭ tro malmultnombraj. Kiel aviadilo bezonas iun rapidecon por forlasi la grundon kaj ekflugi, same ekzistas evolusojlo. Tio signifas, ke iu popolo bezonas certan kvanton da konsciaj kaj aktivaj homoj por forlasi la staton de subevoluo. Izolitoj dronas en la amaso.

En ĉi tiu artikolo, mi povis skizi nur unu aspekton de la tuta problemaro. Mi ne parolis pri uzendaj rimedoj por atingi rezultojn, pri la grandega rolo kiun povas kaj devas ludi instruado, lerneja kaj eksterlerneja, ktp. La rapida unuecigo de la mondo postulas iom post ioman malaperon de la tro grandaj materiaj diferencoj, sed per nura sentimentaleco kaj kompato ni ne solvos la problemojn.

Per mia akcentigo de la homa faktoro en la evoluproblemaro, mi tute ne volis nei la neceson de gravaj monrimedoj, sed ĉi tiuj servu al rekta evoluigo de la popolo, kaj ne al riĉigo de kelkaj potenculoj, nek al starigo de tute nenece-saj prestiĝaj privataj projektoj, aŭ certege ne al stulta armado.

Mi havos la okazon, en serio de artikoloj pri miaj travivaĵoj en Zairio post la sendependeco de tiu lando en 1960, precizigi kelkajn ideojn kaj pripensojn troviĝantajn en la supra artikolo.

Reagoj, ĉu pozitivaj aŭ negativaj, estas bonvenaj!

1. Temas pri disertacioj kiujn verkis studentoj el la tria mondo en la Kolegio por Evolulandoj en Antverpeno (Belgio), en kiu mi estis asesoro dum pli ol dek jaroj.

Tekstojn por la rubriko eseo vi sendu al la eldonejo:

FEL,
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Belgio

LITERATURO

Kiel fartas eldonado en Francio?

Statistikoj de Unesko montris, ke francoj legas iom pli ol... homoj en evoluantaj landoj, kie abundas alfabetoj! Kaj nur certa procentaĵo (instruantoj, studentoj) legas preskaŭ ĉion, dum aliaj ne aĉetas eĉ unu libron jare. Tamen eldoniĝas jare 16 000 titoloj. Plej bone vendiĝas ne veraj literaturaĵoj aŭ ĉefverkoj, sed ĝenerale libroj verkitaĵoj aŭ verkigitaj de famuloj, ĉu aktoroj, televidaj ĵurnalistoj, kantistoj aŭ politikistoj, kies nomo estas populara ĉe la loĝantaro, sed kiuj ankaŭ uzas famajn gemikojn por reklami sian libron. Ĝenerale, tiuj verkoj finvendiĝas dum du monatoj post la apero.

Kie vendiĝas?

Pro la granda nombro de eldonaĵoj, ne ĉiuj librovendejoj povas ĉion havi stoke; pro la prezo de iu libro, difinita kaj presita sur la kovrilpaĝo, homoj ne aĉetas aŭ atendas, ke ĝi estu reeldonita poŝformate post kelkaj jaroj. Tiam ĝi ne pli kostos ol enirbileto de kinejo. Ankaŭ pro la fakto, ke sukcesa libro vendiĝas en 10 000 ekzempleroj, dum ekzistas 25 000 librovendejoj (ĉu privataj, ĉu filiaraj, ĉu ene de granda magazeno), matematike ne eblas trovi ĉiujn librojn ĉie ajn. Tio ankaŭ klarigas la fakton, ke malaperas librovendejoj, ĉefe malgrandaj en malgrandaj urboj.

En eldonejo Messidor ekzistas tri branĉoj: homaj sciencoj, infanlibroj kaj literaturo el kiuj unu eldonas eksterlandan literaturon. Meze aperas en jaro 100 titoloj, ĉu novaj, ĉu reeldonaj. La meza eldonkvanto estas 4000, minimuma 1500, maksimuma 10 000 (maloftaĵo, nur kiam la eldonejo atendas furoran sukceson).

Fremdlingva literaturo

Messidor aĉetis la stokon de *Éditeurs français réunis*, eldonejo fondita de la franca engaĝita poeto Aragon, post la dua mondmilito. Tiam fariĝis tradicio, ĝis la 60aj jaroj, eldoni progresemajn verkojn el Orient-Eŭropo; tio ankaŭ koincidas kun la celo diversiĝi la eldonaĵojn kaj rehavi la plej bonan el la tutmonda literaturo. Kiel oni selektas verkojn? Nu, laŭ ilia rekonata literatura valoro, agnoskita en la koncerna lando mem, pro la famo de la verkisto (se

tiu estas jam bone konata de la eldonejo, kiel Ajtmatov el Kirgizio, Amado el Brazilo) aŭ pro ilia engaĝiĝo en la nuna vivo.

Tradukado

Ĉar la literatura direktoro ne regas ĉiujn lingvojn de la mondo, li estas helpata de diversaj kolekto-direktoroj el la „grandaj lingvoj”, kiu proponas tradukon aŭ verkon, kiu estos tiam proponata al tradukisto. Ĉiuj tradukistoj estas amikoj de la konsilantoj kaj selektantoj, kiuj fidas ilin. Tradukado daŭras meze unu jaron kaj la traduko ne estas reviziita; nur relegita de homo, kiu ne konas la originalon kaj ĝin legas kaj aprezas, kiel „normalan” franclingvan verkon. Ĝeno en la propagandado (lanĉo kaj informado) estas, ke laŭ la nuna franca reklamsistemo, necesas, ke la verkisto partoprenu televidelsendon pri literaturo – ekzistas du tiaj – kaj parolu pri sia libro. Se la verkisto ne sufiĉe mastras la francan lingvon, li ne aperos televide kaj sekve tiu libro estos preskaŭ ignorata de la amaso.

Eblas konkludi, ke la francoj ne multe legas, ĉar ili rigardas la televidon, kaj cetere ili legas nur tion, kion ili vidis ĉe la televido!

Renée TRIOLLE

INKUNABLOJ

Malnovaj, tamen aktualaj

Inkunablo estas libro presita en Eŭropo antaŭ la jaro 1500. Krom siaj kutimaj inkunabloj kaj manuskriptoj, la publika biblioteko de la urbo Bruĝo (Belgio) konservas en aparta sekurigejo 155 post-inkunablojn. Por ekspozicio en „De Biekerf” (La Abelujo), oni elektis 55 el ili, kiujn la publiko antaŭe neniam vidis.

La eŭropa 16a jarcento travivis la ekeston de humanismo kaj de reformacio. Unu el la ĉefaj, se ne eĉ la ĉefa rimedo de ties rapidaj kaj vastaj evoluadoj, sendube estis presformaj libroj, plej elstara komunikilo de la „novaj tempoj”. La preslarto, inventita meze de la 15a jarcento, estis nova tekniko uzanta apartajn tipojn. Tipografie la plej fruaj presaĵoj, la inkunabloj, multe similis siajn antaŭvenintojn, la manuskriptojn, en tio ke uzigis i.a. gotikaj tipoj, randornamoj, lignogravuraj ilustraĵoj, dukolumna tekstoprezento, kaj kolofono malantaŭe

en la libro, kun nomo, dato, kaj loko de kopiado aŭ presado.

Novan aspekton ricevis iom post iom la postinkunabloj – presitaj inter 1500 kaj 1540. Tiam vere ekestis la moderna libro, kiu ebligis reaperigi antikvajn tekstojn, kaj pli vaste disigi la novajn ideojn, vidpunktojn kaj opiniojn. Ĉie en Eŭropo pli kaj pli da presistoj klopodis kontentigi la dezirojn de humanismaj verkistoj, kiuj preferis sobecon kaj antikvajn ornamojn. Ĉefe en Italio novaj formoj tipografiaj superŝutis Eŭropon: la gotikan tipon anstataŭis la ĝis hodiaŭ uzataj romena¹ kaj kursiva, la kolofonon anstataŭis tre ellaborita titola paĝo, la teksto okupis la tutan paĝon senkolumne, kaj malaperis la randornamoj. Pli kaj pli da ilustraĵoj uzigis, ne kiel ornamoj, sed por klarigi la tekston. La presista marko klare indikis la originon de la libro. Krome plifaciligis la libroformato (oktavo). Plej ofte presitaj libroj aĉeteblis en formo de aro da folioj ne kunfiksitaĵoj, kiujn oni nur poste bindis.

„Presarto” eble ŝajnas bela kaj iom romantika afero. Tamen, la libropresisto antaŭ ĉio estis komercisto kies ĉefa celo estis profito. Nur dualoke li estas artisto. Klare montras tion la listo de la plej gravaj presurboj: Parizo, Bazelo, Antverpeno, Liono, Kolonjo, Nurenbergo, Venecio, ktp. Ĉiuj estis urboj kun grava kultura infrastrukturo, vaste disbranĉigitaj komercaj retoj, kaj – plej grave – kapitalamaso investebila en papero, presiloj, tipoj, salajroj, vendoretoj, ktp. Ekde la komenco, do, libropresado estis liberkomerca afero. Senkompata estis la konkurenco, kiel montriĝas el la ĝemplendo de iu bazela presisto, kiu en 1518 skribis al Erasmo: „Iu Eucharicus Cervicornus en Kolonjo preskopiis el nia eldono kelkajn leterojn verkitajn de Hieronimus. Ni plendis kontraŭ li ĉe la tribunalo en Frankfurto... La pariza presisto Jean Petit senĉese ĝenas nin: li minacas ĉion preskopii...”

La ekspozicio de postinkunabloj en „De Biekerf” kompreneble atentis ankaŭ pri la tiama bruĝa tipografio. Koncerne libropresadon Bruĝo ludis signifoplenan rolon. Ĝia plej fama presisto de postinkunabloj estis la lignogravuristo Hubert de Croock [Krok], ĉe kiu i.a. la hispana bruĝano Juan Luis Vives [Ĥuan Luis Bibes] kaj la historiisto Jacob de Meyere [Mějere] presigis plurajn verkojn. Krome en Parizo la flandro Jodocus Badius estis tre aktiva en la libropresa mondo.

Johan VAN EENOO

1. Romena: (en tipografio) rekta.

VATIKANO

**Returne
en la mezepokon ?**

Post relative tolerema periodo, la Kongregacio de Vatikano subite postulis, en letero al la episkopoj de Usono, ke oni kontraŭstaru la leĝan egaliĝon inter sam- kaj ali-seksemluloj kaj ke oni ne dungu gejojn en la armeo, infanzorgo, aŭ edukado. Sekve la nederlanda ĵurnalo por samseksamuloj *De Gay-krant* (La Gej-gazeto) deklaris ke oni juĝalvoku la episkopojn de Nederlando se ili subtenos la postulon de la kardinalaro. Laŭ *De Gay-krant* temas pri diskriminacio al minoritato. Oni memorigas al la episkopoj ke tio tute kontraŭas la nederlandajn leĝojn; se ili konsentos kun Vatikano, oni sekve rigardos la Romkatolikan Eklezion kontraŭleĝa.

Enorma fendo

Simile, *Katholieke Onderwijsvakbond (KOV)*, la katolika edukistosindikato, koleras pri la „enorma fendo” inter la starpunktoj de la Kongregacio kaj nederlandaj katolikoj, kaj intencas kontraŭstari la kardinalojn per internacia agado. Laŭ KOV, oni ne rajtas doni „ŝajnon de justeco al diskriminacio per citado de teologiaj argumentoj”.

Vatikano atakita

Parlamentano Van Ooijen [Fan Oj^en], laboristpartia membro de la Supera Ĉambro de Nederlando kaj ankaŭ sacerdoto en la ordeno dominikana, publike atakis Vatikanon en artikolo kaj kaŭzis reagon ĉe la fondaĵo Titus Brandsma, asocio de konservativaj katolikoj. Laŭ reprezentanto de ĉi tiu grupo, Van Ooijen devas ne nur lasi la ordenon sed ankaŭ perdi sian pastrecon: „Li obstinigas aktivajn samseksamulojn en ilia sinteno. Li devas instrui al ili pri la doktrino de la eklezio kiu malpermesas samseksajn kontaktojn.”

Intertempe, la Eŭropa Komisiono pri Homaj Rajtoj konsideras la aferon. Seán OSBORNE

Kontribuojn por la rubriko „spirita vivo” vi sendu al:
Gerrit Baveling
Muiderslotstr. 69
NL-4834 KM Breda
Nederlando



Denove en Kievo, denove apud Katedralo de Sankta Sofio malsatas reprezentantoj de la kredantaro de Ukraina Aŭtokefala Ortodoksia Eklezio (UAOE). Ili estas kieva urbestarano Jurij Karha, kiu antaŭ nelonge fariĝis monaĥo, kaj studento universitata Jurij Saĵa. Per antikva peza ĉenaro ili fiksas sin al katedrala pordego kun la slogano: „Ukrainio estas libera, sed restas en ĉenaro”. La malsatantoj postulas de la registaro doni al UAOE rajtojn egalajn je tiuj de la Roma kaj Moskva eklezioj, redoni la katedralon kaj kelkajn preĝejojn al ilia eklezio. De la parlamento oni petas kunordigi la religian leĝaron. Je demando „ĉu permesas la kredo agi tiel kaj, malhelpu ĝin Dio, eĉ ĝis la morto?”, pastro Izjaslav (la monaĥa nomo de J.Karha) respondas: „Mi ne havas alian eliron. La kredo permesas suferi por la eklezio. Se ni ne venkos nun, nia eklezio pereos...”

Araneo

HOBIO

Riverludi

Dum multaj jaroj mi entuziasmiĝis pri la solecaj montoj ĉirkaŭantaj la patagonian lagon Nahuel Huapi, ĉe kies bordo mi loĝas. Dum tiom da feliĉaj tagoj mi tramigris ties valojn kaj kres-tojn, surgrimpis ties pintojn. Sed antaŭ pli ol deko da jaroj mi ekmalkovris samvaloran plezuron: malsuprenligiti en boateto laŭ patagoniaj riveroj.

Tiamaniere oni ĝuas trairi vastegajn ebenaĵojn, krutajn montojn, arbarojn, duondezertajn stepojn. La densa vegetaĵaro troviĝas precipe en la ĉilia flanko de la anda montarĉeno, kiu baras la vojon al la nuboj venantaj el Pacifiko. Tial en la argentina flanko de Andoj etendiĝas sekaj stepoj, kies tipaj riveroj estas *Aluminé, Pichi-Leufú, Chubut, Santa Cruz*. Male, en la bordoj de la ĉiliaj riveroj *Toltén, Bueno, Yelcho, Palena* kreskas belegaj arbaroj.

La patagoniaj akvo-fluoj ne nur diferencas inter si pro sia ĉirkaŭaĵo, sed ankaŭ pro sia konduto kaj potenco. Proksime de la montaro kelkfoje muĝas mortigaj akvofaloj, kirliĝas kaj antaŭenstumas danĝeraj rapidfluejoj. Tiaj riskejoj maloftas en la ebenaĵo, kie la akvo kutimas kondukti pli trankvile.

Do oni devas elekti prudente, kian itineron oni preferas. Ankaŭ la specoj de uzataj boatetoj estas malsamaj. Per kajako sperta kajakulo sukcesas superi eĉ akvofalon kaj tre sovaĝajn ra-



(Foto W.S.)

Multloke en la rivero Fuy (Ĉilio) sovaĝaj rapidfluejoj devigas surbordigon.

pidfluejojn, kie pneŭmatika boato renversiĝus. Sed tiu lasta estas pli komforta kaj en ĝi eblas kunporti tendon, nutraĵojn, ktp. Male, sur lagoj kaj trankvilaj riveroj la kanuo estas pli oportuna ol la pneŭmatika boato.

Por ĝui la apartan belecon de akvo-fluoj ne necesas tranavigi ilin. Ankaŭ eblas sekvi piede, ĉevale aŭ aviadile ties vojon. Krome, estante nur sur la riverbordo oni ja povas ĝui la misterajn liniojn kaj kapricajn dancojn de la fluo. Sed gravas kaj penvaloras sperti solecajn riverojn ankaŭ senmotore por ne ĝeni, nek malhelpi ties pacan harmonion, kiun ni povas enigi en la animon.

Werner SCHAD

FILATELO


Omaĝe al *homo erectus*

Okaze de la inaŭguro de muzeo pri prahistorio en la vilaĝo Tautavel, 20 km for de Perpignan [Perpinjá], Katalunio, proksime de la hispana landlimo, la franca poŝto eldonis belan poŝtmarkon, kiu prezentas la prahistorian homon *homo erectus* (= rektestara homo).

Sur tiu ĉi teritorio en 1972, Marie Antoinette [Marí Antŭanét] kaj Henry de Lumley [Enri de Lamlej], malkovris la kranion de tiu fosilia homo, malnova de 450 000 jaroj proksimume. Oni faris robotan portreton de li, uzante parton de la kranio. Oni determinis lian grandecon je 165 cm. La nazon kaj frunton oni ne sukcesis precizigi kun ekzakteco. Ankaŭ la haŭtkoloro restas enigmo.

La unuan muzeon oni konstruis tie en la jaro 1979. Ĝi havas proksimume 300 m² da areo. Nun tiu ĉi muzeo estas pliriĉigita per novaj malkovroj. La poŝtmarko prezentas la „Homon de Tautavel” en momento de ĉasado.

Alberto SOLARZ




Trapasi la rapidfluejojn bezonas lertan manipulado!

(Foto Tulio Calderón)



enigmoj

Ĉelara enigmo Reinhard FÖBMAIER



Skribu en la ĉelojn ĉirkaŭ la numeroj ses-literajn vortojn laŭ la difino, laŭ horloĝa direkto. La vortoj komenciĝas en la ĉeloj markitaj per sago. En la meza horizontalo vi trovos solvo-vorton.


- | | |
|---|----------------------------|
| 1. planto kun ses-petala, vazoforma floro | 7. mapo-libro |
| 2. korpoparto inter kolo kaj ventro | 8. senhara hom' |
| 3. skuiĝo de flamo | 9. disdivid' en du partojn |
| 4. balanciĝanta tien kaj reen | 10. plenkreskulo |
| 5. servic' el duon-sferaj tasoj | 11. burleskulo en cirko |
| 6. kristana preĝejo muzikilo | 12. ĵet-bomb' |

Bildenigmatoj: serĉu la vortojn helpe de la bildoj.

KUR	ES RA T	F T
E14%Z	KKK LOR	P D E C Y K L S
Ni laboro paŝo paŝo atingos glolacelonro. Z.		IGAMUZAJMOJ

Klivo Lendono, Kanado

Diamanto de 2 al 8 ĉeloj




Horizontale

2. Flankeniri (radiko).
4. Infuz' de kuracaj herboj.
6. Montrus fotografie.
8. Sekse ekscitige.
9. Batal-lanĉo.
10. Valora metalo.

Vertikale

1. Revuoj kaj ĵurnaloj.
2. Centra punkto ĉirkaŭ kiu io rotacias aŭ balanciĝas.
3. Plor-aspekta arbo, kiu kreskas apud akvo.
4. Mal-puŝa.
5. Subkapa korpoparto.
6. Denove.
7. Kondiĉa vorto.



ANGUL-ENIGMO

En ambaŭ direktoj: 1 malsupera ofi-ciro. 2. kaŭzanta naŭzon. 3. fekund-iga florpolvo. 4 lasta litero de l' greka alfabeto. 5 rilata al urinprodukta organo. 6. membro. 7. difina artikolo. 8. mil por organizo
Stano MARĈEK

Solvojn vi trovos en venonta numero.

Sintakso

Viro, ŝajne indiferenta, telefonas la intendanton de psikiatria hospitalo:
„Sinjoro, ĉu hazarde mankas al vi iu el viaj pacientoj?”

„Ne, tute ne,” respondas la kuracisto.
„Ĉiuj estas ĉi tie, kun kiu mi parolas?”
„Nu, tute ne gravas,” daŭrigas la telefonanto, „Estas nur ke mia edzino ĵus forlasis min, kaj fortrotis kun alia viro”

In ĝin-toniko veritas

La scenejo estas trinkejo en Berlino.
Drinkanto vokas al la baristo: „He! Vi! Ĉu citronoj havas krurojn?”

La baristo respondas negative, tute nature, kaj la kliento komencas ruĝiĝi.
„Ho ne! Pardonu min! Mi ĵus dronigis ies kanarion en mian koktelon!”

En la sama ejo, vermo apogas sin ĉe la baro (jam trinkante la sepan ĝin-tonikon) kaj ploras, ploras senhalte.

„Kio okazas al vi, sinjoro?” demandas la simpatia baristo.

„Aj, nenio,” larme singultas la vermo, kun lasta klopodo regi siajn emociojn. „Temas nur pri mia frato, Vilhelmo Vermo. Li iris frue ĉi-matene por fiŝkapti... kaj li ankoraŭ ne revenis!”

Jen nia mondo

Membro de GEJO (ne, mi ne intencas identigi ŝin) suferis etan akcidenton en sia aŭto. Policisto arestis ŝin, kaj fortrenis ŝin al la policejo.

„Kial mi 'stas ĉi tie?” ŝi demandis, ne tre klare.

„Misuzo de alkoholaĵo,” ĝentile respondis la funkciulo.

„Bone,” muĝis s-ino Z. „Trioblan viskion. Sen akvo. Dankon!”

Telefonaĵo

Telefonado

„Saluton, s-ino Hirsch, jen Centra Oficejo, Universala Esperanto-Asocio, Roterdamo. Ĉu mi rajtas paroli kun via edzo?”

...
„Kion? Vi ne vidis lin?”

...
„Vi ne vidis lin de post kiam li foriris hieraŭ?”

...
„Jes, mi scias ke mi ripetas ĉion kion vi diras.”

...
„Jes, mi scias ke tio estas tre ĝena trajto.”

...
„Jes, mi scias ke mi ankoraŭ faras ĝin...”

...
„Ho ve, ŝi malŝaltis!”

Bonaj konsiloj

Por scii precize kiel feliĉa motorbiklisto estas, nur kalkulu la muŝojn sur liaj dentoj...

Oficiala raporto pri tabako

1. Ĉiujare, la nombro de plenkreskuloj kiuj fumas pliiĝas po 2 %.

2. Ĉiujare, la nombro de dekelkjaruloj kiuj fumas malpliiĝas po 2 %.

3. Ĉiujare, 2 % da dekelkjaruloj plenkreskas.

Gravaj gastoj

La dunganto de Paĉjo kaj ties edzino alvenis por vespermanĝi, kaj la patrino diras al la fileto diri tablo-preĝon.

La fileto estas iomete embarasita, kaj tute ne scias kion diri.

La helpema patro sugestas ke la knabo simple ripetu kion Panjo diris hieraŭ.

La etulo kunmetas la manojn religie, kaj entuziasme fermas la okulojn: „Ho Dio.” li sopranas. „Kial tiuj stultegaj homoj venos manĝi ĝuste morgaŭ?”

Du kanibaloj, patro kaj filo, promenas laŭ la strando de bela insulo. Tie ili ekvidas eksterordinare belan blondulinon, en bikino.

„Patro, mi havas bonegan ideon. Kial ne konduki ŝin hejmen... por manĝi ŝin?”

La saĝa patro: „Mi havas ideon multe pli bonan. Ni konduku ŝin hejmen... kaj manĝu Panjon!”

Subaŭskultita en Vieno

„Kara! Mi ĵus aĉetis novan beleco-kremaĵon ĉe la kongreseja butikio. Vi konas ĝin, ĉu ne? Vi povas elekti el tri

diversaj specoj: Allogeta, Belega, kaj tiu ĉi – István Ertl!”

„Kiel ĉarma junulo! Lia vizaĝo tre similas al iu kiun mi aŭskultis en la radio.”

„Sed ĉu vi ne aŭdis? La komitata laboro fariĝis tro problema por li, kaj li provis mortigi sin. Per elektra razilo.”

„La kompatinda – mi tre kompatas ŝin. Ŝi perdis la gepatrojn kiam ŝi havis nur kvar jarojn. Fakte, ŝi ĉiam tre malbone ludis pokeron.”

„Jes, estas absolute vera rakonto. Moskito pikis lin. En La Habana.”

„Povra insekto, ĉu ĝi ne tuj fariĝis alkoholisto?”

Interrilatoj

„Ĉefo, ĉu mi rajtas havi iiberan horon por viziti la barbiron?”

„Ne. Ne dum oficejaj horoj.”

„Sed miaj haroj ja kreskas dum oficejaj horoj.”

„Jes, sed ili kreskas ankaŭ en via propra tempo, ĉu ne?”

„Nu, oni ne tondos ĉiun haron, ĉu?”

„Laŭ ĉielo, Georgo, kiu rompis al vi la kruron?”

„Mia fianĉino...”

„Via fianĉino? Sed ŝi libertempas en Malmö, ĉu ne?”

„Ha, jes, ankaŭ mi pensis tion.”

Serpentido kuregas – nu, glitegas – al sia patro.

„Paŝjo, ni ne eŝĉas venenaj ŝerpencoj, ŝu?”

„Ne, kara,” respondas la dorlota skvamulego „Kial vi demandas tion?”

„Ha, Paŝjo, kia konsolo. Mi ŝuŝ mor-diŝ al mi la langon!”

Konsilo por lavi infano-piĝamon




Unue, forigu la bebon!

Foto: Anja Blom

Dräger

Radioj de l'espero



Grundo, akvo, aero – ĉi ni risku la purecon de ĉi tiuj nemalhaveblaj medioelementoj?

Jam tro ofte ni perdis. Ni povas esti trankvilaj nur, kiam ni ekkonas danĝerojn sufiĉe frue kaj kontraŭbatalas ilin sukcese.

Mallongtempa analizo per accuro[®] kaj Dräger-testtubetoj

La nova gasezura sistemo accuro konsistas el unumane manipulebla pumpilo, pumpilaŭtomato kaj la gamo da testtubetoj Dräger-Röhrchen rapide indikantaj sandamaĝajn substancojn.

Per ĉi tiu racia, ĉeloke uzebila sistemo vi kapablas mezuri per ppm – precizeco pli ol 550 nocojn en la grundo, akvo kaj aero – por finfine eviti riskojn kaj por la sano de homoj kaj por la medio.

Drägerwerk AG, Lübeck
Produktbereich Dräger-Röhrchen
Telefona (4 51) 8 82-8 06
Telefakso (4 51) 8 82-48 50

Dräger.
Porviva tekniko.



Antverpeno... urbo de arto, urbo de kulturo, kie ankaŭ haveno kaj diamanto brilas!

Dum horoj vi povas tie ĉi promeneti, socieme laŭ la bordo de la rivero, aŭ alrigardi la vivan teatraĵon, ripoze sidante sur unu el la sennombraj, kolorriĉaj, etosplenaj terasoj. Vi povas promenadi kaj butikumi tra belaj stratoj kaj viglaj placoj. Kaj vi povas konatiĝi kun la kulturriĉa historio de la urbo.

Sed 1993 estas pli ol ĉio tio!

Ĉar en 1993 Antverpeno estos dum tuta jaro Kultura Ĉefurbo de Eŭropo.

En 1993 tra Antverpeno zumbros la kulturaj aktivaĵoj, tutan jaron!

Jen plia kialo por viziti Antverpenon!

antwerpen 93

Kultura ĉefurbo de Eŭropo

Turisma Servo
Grote Markt 15
Tel. (03) 232 01 03
Fax (03) 231 19 37

Info 93
Grote Markt 29
Tel. (03) 226 93 00
Fax (03) 226 15 55